

„La alvoko al la internacia funkcio por Esperanto malaperis – la lerno de Esperanto alportas nenian plibonigon de la propra sorto”

Intervjuo-dialogo kun d-ro Tazio Carlevaro (Bellinzona, Svislando)

La demandojn starigis Andreas Künzli

1

Andreas Künzli (AK): Enkonduke ni eble komencu per via persona biografio. En la biografia skizo pri vi publikigita en la Svisa Planlingva Enciklopedio (2006)¹ estas skribite: „Kun siaj multflankaj intereso kaj kapabloj pri lingvistiko kaj planlingvoj Tazio Carlevaro fariĝis frue aktiva kaj konata en la interlingvistika movado.” Kvankam vi studis medicinon kaj fariĝis kuracisto kaj psikiatro, kial vi interesiĝis pri lingvoj kaj lingvistiko? Ĉar en la Svisa Planlingva Enciklopedio ni kutime ne raportis pri la gepatroj de la esperantistoj kaj interlingvistoj, nun ni povas okupiĝi pri ĉi tiu temo. Do kiuj estis viaj gepatroj kaj kiel vi pasigis vian infanaĝon?

Tazio Carlevaro (TC): Mi naskiĝis en multlingva hejmo. Nome mi jam denaske parolis kaj la tiĉinan, kaj la italan. Sufiĉe poliglota familio: mia patrino bone sciis la francan kaj latinan. Mia avo bone sciis la francan, svisgermanan, germanan, hispanan kaj anglan. Kun ni vivis frato de nia patrino, kiu bone sciis la francan, germanan (ankaŭ svisgermanan) kaj anglan. Abundis libroj en multaj lingvoj, ankaŭ antikvaj libroj de pra-avoj. Lingvo kaj lingvo-diverseco markis mian junaĝon. Ankaŭ pri religio ni estis multflankaj. Anoj de nia familio estis super-katolikoj. Mia patrino estis “normala” kredantino. Mia avo estis framasono. Onklino estis bern-protestantisma. Iu onklo estis severe kontraŭreligia ateisto. Alia onklo, inĝeniero, estis agnostikulo. Mi mem restis agnostikulo, cetere, kiel mia edzino kaj miaj filinoj. Mi mem okupiĝis multe pri religio, nome el historia kaj psikologia vidpunktoj.

Do la etoso estis sufiĉe klera kaj pluraspekte tolerema. Mi povas facile supozi, ke mia avo bone konis la francan iluminismon, kaj la liberalan renesancon kontraŭ-klerikalan. Sed ja, ni klopodis vivi trankvile kune, kelkfoje kun iaj kontraŭdiroj. Mia avino estis tre (tro) religia, sed ŝi adeptis al la radikala (liberala) partio kaj voĉdonis por tiu partio – ne por la katolik-klerikala partio. Mia patro ne vivis kun ni. Miaj gepatroj disiĝis kiam mi estis 2-jaraĝa, kaj li vizitis nin tre malofte.

2

AK: Laŭ via rakonto via avo lernis siatempe Esperanton, kiun li plene forgesis. Li forlasis ĝin, kiam eksplodis la Ido-krizo. Tial vi malkovris ĉe li lernolibrojn de ambaŭ planlingvoj. Sed vi lernis unue Idon, ĉar la supersignoj de Eo malplaĉis al vi, kaj ĉar la lernolibro de Ido estis pli maldika, resume, Ido ŝajnis esti pli facila ol Eo. Kiu estas via opinio multajn jardekojn poste: Ĉu vi kredas, ke la supersignoj de Eo daŭre signifas obstaklon por ĝi, kaj ĉu vi daŭre konsideras Idon pli facila aŭ pli facile lernebla lingvo ol Eo?

TC: Mi ne scias, kial li forlasis planlingvojn. Sed li opiniis, ke temas pri baze bona projekto. Li indikis al mi la du lernolibrojn – nome pri Ido kaj pri Esperanto. Mi komencis lerni Idon, ĉar la lernolibro estis tre maldika. Bedaŭrinde tro maldika. La Esperanta lernolibro estis ja pli dika, sed bone klarigis la gramatikon de la lingvo. Tuj mi imagis, ke eblus unuigi ambaŭ lingvojn, kiuj fakte ne estas tre disaj. La supersignoj estis tiutempe grava malavantaĝo por la disvastigo de la lingvo

¹ Vd. sub http://www.planlingvoj.ch/39_ENCICL_INTERLINGVISTIKO.pdf.

ekster la Esperanta mondo, sed ankoraŭ nun estas tiel. Tial vi uzas/is la h-abocon, kaj mi la x-abocon.²

3

AK: Krom Ido kaj Eo vi enprofundiĝis en la studadon de Occidental-Interlingue (de Wahl) kaj Interlingua (IALA). Kiun lingvon vi preferis kaj preferas, kaj kiu estas laŭ vi pli sukcese konstruita kaj pli facile lernebla?

TC: Mi mem ŝatas ambaŭ. Occidental estas elstare, tre inteligente elpensita kaj bone ellaborita lingvo, ĉar Edgar de Wahl praktike utiligis ĝin longe, antaŭ ol definitivigi ĝin. T.e. li malkovris kaj konsciis, kie povus estiĝi problemoj. Tamen ĝi aspektas pli “komplike”, pli “malfacile”, sed ĝi estas ankaŭ pli esprimriĉa ol Interlingua. Tiu ĉi-lastata lingvo, ido de vortaroj, male, estas malpli ellaborita je niveloj gramatika kaj sintaksa. Sed por mi Interlingua estas pli facila, ĉar mi bone scias la latinan, kaj per kelkaj enmensaj reguletoj mi povas facile “rekonstrui” Interlinguan. Kiam mi tradukis al ambaŭ lingvoj, Interlingua kaj Occidental, komedion de Carlo Goldoni, mi spertis, ke fakte ambaŭ lingvoj “funkcias” bone kaj estas agrable esprimkapablaj.³

4

AK: Vi engaĝiĝis samtempe en la Ido- kaj Eo-movadoj. Kiel idistoj reagis, ke vi okupiĝas ankaŭ pri Eo, kaj kiel e-istoj reagis, ke vi okupiĝas pri Ido?

TC: Mi neniam spertis malfacilaĵojn, ĉar mi neniam miksis la aferojn. Ido kun idistoj, Esperanto kun esperantistoj. Nur unufoje Arthur Baur diris al mi, tre afable, ke propagando de Esperanto kaj propagando de Ido ne estas plej taŭga maniero por paroli pri planlingvoj. Sed fakte mi neniam propagandis Idon. Mi nur verkis en Ido kaj partoprenis en la monataj renkontiĝoj de la Ido-grupo en Zuriko. Kaj mi ofte vizitis idistojn, kiuj rakontis al mi pri la pli frua Ido-vivo en Zuriko. Certe mi ŝatis skribi en Ido, sed mi neniam atingis altan nivelon. Plej granda parto de miaj “verkoj” en Ido fakte estis (ankaŭ) frukto de revizio far spertaj idistoj.

5

AK: Ni rememorigu iomete la tiĉinan planlingvan movadon, kiu intertempe plene estingiĝis. Kiuj ĉefaj figuroj (de la Ido- kaj Eo-movadoj) en Tiĉino restis aparte en via persona memoro? Kaj kiuj estis la ĉefaj kialoj de ĝia fino kaj de via rezigno?

TC: Mi aliris la Esperanto-movadon en Tiĉino tre frue. Sasselli estis mia mentoro, kun Greutert. Sed la granda aktivulo estis Bertolini. Mi bone memoras ankaŭ De Faveri kaj Balmelli. Mi ĉesis okupiĝi pri la Esperanto-movado en Tiĉino, kiam mi rimarkis, ke mi restis la sola aktivulo (post la foriro de Greutert). Ĝenerale mi alfrontas volonte soci-celan laboron, kondiĉe ke ekzistas aliaj homoj kune, kaj ke ekzistas sukcesoj. Io tia forestis komplete, ĉefe post la morto de Bertolini kaj la foriro de Greutert.⁴

AK: Kompare kun Greutert kaj Bertolini, mi ne plu persone konis Sasselli, De Faveri kaj Balmelli kaj nur pli multe eksciis pri ili, kiam mi okupiĝis pri iliaj biografioj kadre de la laboro por la Svisa Enciklopedio Planlingva, cetere ankaŭ dank’ al la materialoj, kiujn vi siatempe disponigis al mi. Kun Kurt Greutert, kiu estis meritplena prezidanto de la LKK de la 64a UK en Lucerno en 1979, kiam mi aliĝis al Eo, okazis terura konflikto en Svisa Esperanto-Societo lige kun la utiligo aŭ administrado de la kongresa mongajno, tiel ke fine li estis eksigita de la asocio kaj foriris (al

² Fakte estas tiel, sed ni interkonsentis provizi la Eo-tekston de ĉi tiu intervjuo per la aŭtentaj Eo-supersignoj.

³ Tiujn tradukojn kaj aliajn interesajn materialojn de TC pri Eo, Occidental kaj Interlingua oni trovas sub https://www.taziocarlevaro.ch/dds_culturali_letterari.html kaj https://www.taziocarlevaro.ch/dds_ling_storici.html.

⁴ La biografioj de tiuj aktivuloj kaj aliaj materialoj pri ilia agado estas konsulteblaj en la menciita Svisa Enciklopedio Planlingva en la interreto atingebla sub <http://www.planlingvoj.ch/enciklopedio.htm>.

Tiĉino). Mi kredas, ke en svisaj Eo-medioj oni neniam plu revidis lin aŭ aŭdis pri li. Komplike, ĉu ne ?

TC: La historio de la Eo-movado en Tiĉino mem estas iom komplika. Ĝi komenciĝis certe post la unua mondmilito kaj malaperis pro la Ido-konflikto. Konata idisto en Bellinzona estis Agostino Bonzanigo, kies idisteco tamen ne daŭris longe, des pli ke li ne sukcesis krei Ido-movadon en Tiĉino. La Eo-movado renaskiĝis tuj post la dua mondmilito en fervojistaj medioj (SAEF). Mi konis la homojn de tiu epoko, kiuj ŝatis vojaĝi kaj renkontiĝi en la renaskiĝanta Eŭropo. Kurt Greutert estis unu el tiuj homoj, kiu aktivis kaj en SAEF kaj en Tiĉina Esperanto-Ligo (TEL). Li estis (aŭ estas – mi eĉ ne scias, ĉu li vivas ankoraŭ)⁵ argoviano, sed li vivis en Tiĉino, nome en Giubiasco, kie li edziĝis kun tiĉinanino, kaj kie naskiĝis iliaj filinoj. Li longe laboris kiel lokomotivestro.⁶

6

AK: Vi estis kunaŭtoro de la signifa libreto *Esperanto en perspektivo* (UEA 1974⁷), en kiu vi prilaboris la ĉapitrojn pri la kulturo kaj literaturo de Eo. Al kiuj konkludoj vi venis pri la trajtoj de la kulturo kaj literaturo de Eo kadre de tiu laboro? Ĉu hodiaŭ vi eventuale skribus alimaniere aŭ pli kritike pri tiuj temoj?

TC: Tute ne. Mi ne volis verki historion de la kulturo kaj literaturo de Esperanto. Sed pretigi komenton pri la bibliografio de Esperanto. Indiki al la homoj, kio estas leginda – ĉu tio plaĉos aŭ ne, temas pri persona percepto. Kulturo de lingvo konsistas ankaŭ el la konstruo de scio pri historio kaj pri kio ekzistas. Cetere, tiu verkaĵo (kiun mi reaperigis en mia elektronikejo www.taziocarlevaro.ch kiel pdf-dokumenton⁸) plaĉis al la publiko. Fakte la nunaj literaturhistorioj de Esperanto (kiel tiu de Minnaja-Silfer) estas multe pli literaturscience orientitaj. Foje mi laŭdis Minnaja-n pri ilia libro. Mi diris al li: „Finfine aperis digna libro pri la literaturo de Esperanto”. Li rimarkigis al mi ke, tamen, ankaŭ mia kontribuaĵo al EeP estis interesa. Eĉ tiom interesa, ke en la libro de Sutton (*Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*) la plej ofte citita aŭtoro estas ĝuste Carlevaro. Mi estas tre fiera pri tio. Ĉar tio demonstras, ke mi tuŝis temon vere gravan. Certe mia maniero alfronti ĝin ne estis perfekta aŭ ĉion-indika kaj -enhava. Mi volis simple montri, ke la studado de la literaturo kaj kulturo esperantlingvaj estas valoraj aktivo-kampoj.

AK. En ordo! Bona okazo por relegi vian gravan kaj valoran kontribuaĵon siatempe verkitan kaj publikigitan en la nomita libro! Sed se oni volus reeldoni tiun ĉi verkon (*Esperanto en perspektivo*), kion oni devus fari alimaniere, ŝanĝi enhave, metode?

TC: Mi nenion ŝanĝus, kaj fakte mi nenion ŝanĝis en mia pdf-eldono. Ĉar mi celis ĝuste tion, kion la leganto trovas en ĝi. Mi estas tre kontenta, ke iuj malkonsentis pri mia maniero prezenti la aferojn, ĉar tio estas kreiva sinteno. Diskuto ĉiam estas bonvena, kaj, cetere, la tempopaso aliigas la vidpunktojn. En ĉiuj kampoj. Laŭ mi nur iom post iom ekaperas vere literaturscience orientitaj verkoj pri la Esperanta literaturo. Biografioj, antologioj, kritikaj eseoj. La samo koncernas la historion kaj la sociologion de Esperanto, kiun oni ĝenerale priskribis per tendencaj kaj ideologi-riĉaj artikoloj aŭ eĉ libroj.

7

AK: Ie mi legis – aŭ eble vi mem iam ie menciis ĝin –, ke en tiu tempo vi estis influita de marksis-

⁵ Laŭ ĵusa trovaĵo en interreto Kurt Greutert, naskita en 1927, forpasis la 10an de majo 2020 (vd. <https://www.todesanzeigenportal.ch/todesanzeige/Greutert/Kurt>).

⁶ Provo de historia skizo, eble ne kompleta, pri la tiĉina Eo-movado troveblas sub http://www.planlingvoj.ch/30_ENCICL_ESPERANTO_T-U.pdf.

⁷ La plenan verkon *Esperanto en perspektivo* oni trovas sub <https://www.ivolapenna.org/verkoj/verkoj2.htm>.

⁸ Vd. https://www.taziocarlevaro.ch/dds_culturali_letterari/A5_Carlevaro_Esperanto_Perspektivo_Kulturo_2074.pdf.

maj ideoj. Kiel tiuj ideoj esprimiĝis kaj en kiu senco/maniero ili influis vian planlingvan laboron? Ĉu poste vi forlasis la marksismon, kial, eventuale favore al kiuj aliaj ideoj?

TC: Mi venas de familio liberal-radikala. Do etburĝa, kaj kun fortaj soci-moralaj sentoj. Iom post iom la liberalaj partioj (ne ĉiuj, ne ĉie) tro ligiĝis al moderna kapitalisma entreprenemo kaj ne plu kapablis reprezenti la etburĝan soci-grupon. Ne nur: la moderna liberalismo timas la ŝtatan intervenon. Nur profito gravas. Tiam mi transiris al la socialismo. Kaj fakte Marx estis elstara analizanto de la kapitalisma ekonomio de sia epoko. Bedaŭrinde li konstruis filozofion, kaj ne veran ekonomian teorion. Laŭ li la historio havas “celon”, kaj ekzistas historiaj fazoj, neeviteblaj. Li multe insis-tis ankaŭ pri la etiko, kaj la konstruo de la “nova” homo altruisma. Etiko estas grava aspekto ĉe la etburĝoj. Kaj facile oni povas miskompreni Marx. Li teologiis, sed vendis sian varon kvazaŭ “scienco”. Fakte marksismo estas tipe okcidenta religio, kiu predikas la finon de la nuna mondo kaj la estiĝon de nova, tute renovigita vivo, pli justa. Ĝi estas moderna formo de jud-kristana mesiismo. La “pruvo” de tio estas la ekzisto de “leĝoj”, kiuj difinas la direkton de la evoluo. Tio altiris junulojn. Ne longe, ĉar la tiel nomata “reala socialismo” montriĝis katastrofa, ankaŭ koncerne la du centrajn punktojn de radikala etburĝo: libero kaj socia konsento.

Kiel sciante, en la ŝtato de Lenin ne efektiviĝis la idealismaj imagoj de Marx, sed la rezulto estis katastrofa: diktaturo, teroro kaj nekapablo konstrui vivipovan ekonomion. En marksisma ŝtato oni povas bone distribui la ekzistantan riĉon, sed oni nur malbone povas krei novan, pluan riĉon, ĉar mankas la konsento pri la valoro de konkurado. Do analizu marksisme, sed sen la filozofiaj, preskaŭreligiaj aspektoj. Sed junuloj povas senti sin altirataj de tiu mesiisma sinteno, kaj etika alvoko. Mi estas ano de socialdemokrata partio: gravas individua libero, gravas kultivo de la individueco, gravas etika sinteno (respondeco), gravas socia konsento demokrata, kaj gravas solidara subteno al problemaj sociaj grupoj.

AK: Eĉ Gorbaĉov poste emfazis, ke ĝi ne estis vera socialismo, kiu devus signifi liberecon, egalecon, justecon kaj solidarecon. Necesus esplori kaj diskuti, kiuj elementoj de la origina marksisma ideologio devis esti transprenitaj kaj enkondukitaj post la revolucio de 1917 en Ruslando, kaj kiuj elementoj estis transformitaj, “pluevoluigitaj” kaj adaptitaj al la realo en la senco de Lenin kaj Stalin, tiel ke okazis tio, kio okazis. Ĝenerale oni ja diris/as, ke la marksismo enhavis bonajn ideojn, sed ili ne estis praktike realigeblaj. Iuj kritikistoj nature asertas, ke jam en la origina marksismo ekzistis nenioj bonaj ideoj. Sed en nia intervjuo ne eblas trakti tiun temaron. Ekzistas ampleksa fakliteraturo nacilingva.

Eble interesas vin, kvazaŭ kompare, kiu “ideologia” evoluo okazis ĉe mi. Kiel filo de (“normalaj”) katolikaj gepatroj, kiu kreskis (ekde la 60aj jaroj) en la urbo Lucerno kaj ĉirkaŭaĵo, kiu estas plimulte katolika kaj havas fortan protestant-liberalan minoritaton, mi neniam interesiĝis pri iu ajn politika doktrino en la senco, ke mi aliĝis al iu politika partio. Miaj gepatroj estis CVP-proksimaj, sed ne aktivaj membroj. La etoso estis ĝenerale sufiĉe konservativa, jes ankaŭ etburĝa, sed tamen tolerema. Cetere, en la jaro 68a mi estis nur 6-jaraĝa, do mi apartenas al generacio, kiu ne konscie travivis la tiaman junularan ribelon en Eŭropo, kaj en la 70aj jaroj mi ankoraŭ estis tro juna por adopti ian tian politikan doktrinon. Krom tio la svisaj gazetaro, radio kaj televido ĝenerale raportis sufiĉe kritike kaj negative pri marksismo, komunismo ktp. – Sovetunio, la Orienta Bloko kaj Ĉinio estis malamikoj de la Okcidento, kiu timis tiujn potencojn, kiuj estis konstante agresemaj (interne kaj eksterne), kaj Usono gvidis militon kontraŭ la komunistoj en Vjetnamio. Do tio estis la ĝenerala (aŭ kadra) politika etoso, kaj ne ekzistis la danĝero, ke mi devojiĝus al la maldekstra ideologi-politika sfero. Sed ŝajnas, ke subkonscie mi interesiĝis pri kio okazas en tiuj komunismaj landoj (pro kio oni ne devis esti marksisto, socialisto aŭ komunisto). En la (ŝtataj) lernejoj, kiujn mi vizitis, marksismo ne ekzistis kiel “oficiala” temo, al kiu oni dediĉus apartan atenton (sed mi memoras, ke en la lucerna gimnazio, fako filozofio, almenaŭ dum unu leciono oni marĝene menciis ĝin, ĉar mi ankaŭ memoras, ke mi devis doni difinon pri leninismo, kaj mi tiam menciis la perforton kiel trajton. (En tiu tempo mi jam iom lernis la rusan lingvon kaj aĉetis en lucernaj kioskoj la sovetiajn gazetojn “Pravda” kaj “Izvestija”, kiujn mi montris al mia gimnazia instruisto pri historio, kiu estis

tre mirigita, ke iu gimnaziano scipovas legi tiujn gazetojn). Koncerne la “5 gravecojn”, kiujn vi nomis kiel centrajn punktojn de la socialdemokratio, ili same validis en la kristanaj/katolikaj kompreno kaj ĉirkaŭaĵo kiel paradigmoj (kvankam hodiaŭ oni scias pli pri la bigoteco kaj hipokriteco en la tiama katolika eklezio), do ia marksismo aŭ socialismo (kiu rilatis unuavice al la bezonoj de la laborista klaso) ne estis necesa.

Dank’ al mia aliĝo al Esperanto mi sukcesis emancipiĝi (en la vera senco de la vorto) el tiu iom teda konservativa ĉirkaŭaĵo (mi eĉ parolus pri izoliteco), ĉar mi konatiĝis kun plej diverstipaj homoj, ekzemple socialistoj, komunistoj, ateistoj, liberpensuloj, sed ankaŭ (interesaj) anoj de diversaj etnoj kaj nacioj kaj civitanoj de plej diversaj landoj, ktp., kiujn mi probable neniam estus renkontinta sen Eo. Kiam en la 1980aj jaroj mi ekhavis la okazon, pro miaj universitataj studoj pri slavistiko kaj historio (en la zurika universitato), viziti la landojn malantaŭ la “Fera Kurteno” (unufoje Pollandon en somero 1981, kiam okazis protestoj kaj strikoj), mi povis konatiĝi kun la “reala socialismo” aŭ “reale ekzistanta socialismo”. La ĝenerala mizero nature estis tuj videbla, praktike en ĉiuj sferoj kaj rilatoj de la vivo, de la cenzuro kaj subpremado de opozicio kaj publika kritiko (kulturpolitiko) ĝis la manko kaj malbona kvalito de nutraĵoj kaj varoj (ekonomio). La kontraŭdiroj inter marksisma-socialisma teorio kaj praktiko do estis tuj videblaj. Ĉe mi do definitive ne plu ekzistis la danĝero esti infektita ideologi-politike de iu marksismo, socialismo aŭ komunismo, des pli ke tiu ondo ja ankaŭ iom pasis. Ankaŭ neniu ajn ie ajn provis infekti min.

Vide al la malbona kaj malfacila situacio en la landoj, kiuj nomis sin socialismaj kaj estis regataj de marksisme bazitaj komunismaj partioj, kiuj pretendis reprezenti la interesojn de la laborista klaso, la ĝeneralaj kredindeco kaj allogo de la marksismo, socialismo aŭ komunismo evidente jam estis for, dum en Okcidento oni diskutis pri la verŝajna momento, kiam la popoloj en la socialisma “tendaro” komencis perdi la fidon je tiu ideologio – ĉu en 1953 (GDR), en 1956 (Pollando, Hungario kaj post la parolado de Ĥruŝĉov), en 1968 (Ĉeĥoslovakio) aŭ en alia momento. Sed sufiĉis la praktikaj spertoj, kiujn la civitanoj de tiuj landoj faris, por ke la kredindeco de la oficiala ideologio pli kaj pli ŝrumpu dum la jardekoj de la “reala socialismo” (kiun oni certe klopodis reformi, sed nur duonkore kaj finfine sen esenca rezulto, ĉar la partiaj radikaluloj ĉiam denove bremsis kaj malhelpis tiujn reformojn). Oni venis al la konkludo, ke la Okcidento malgraŭ diversaj problemoj de la “kapitalismo” havas entute pli taŭgan sistemon. Krom tio oni pli kaj pli reale informiĝis pri la teruraĵoj okazigitaj dum la tempo de stalinismo (kvankam publike paroli pri tio en la koncernaj landoj estis severe malpermesite). Do la loĝantoj de tiuj landoj jam delonge mem ne plu estis kontentaj pri la reala situacio de la vivo ĉe ili kaj deziris ŝanĝon de la politika, socia kaj ekonomia sistemoj. La kolapso de la komunismaj reĝimoj en 1989 per la Falo de la Berlina Muro sekvis neatendite; neniu estis preparita al tiu evento, kiu estis vera cezuro en la historio de la homaro, cetere ankaŭ por Eo. La homaro kredis, ke tiu socialismo-komunismo daŭros eterne kaj ke Sovetunio neniam pretos rezigni pri ĝi. Hodiaŭ, kiam la tuta fumo de la tiama revolucia tempo jam delonge forflugis, mi eĉ pli interesiĝas pri tiuj temoj ol en la 80aj jaroj, kiam mi intense okupiĝis pri la lingvoj, kulturoj kaj historioj de la slavaj landoj.

Sed ni revenu al la planlingva kaj Esperanto-movado.

8

AK: Fakte mi devas diri, ke Esperanto neniam estis traktita kiel temo en la de mi vizitataj lernejoj, kaj neniu (nek lernantoj nek instruistoj) interesiĝis pri ĝi. Do en ĉiuj tiuj lernejoj, de la gimnazio ĝis la universitato, mi estis ĉiam la sola e-isto. Mi faris kelkajn prelegojn kaj ekspoziciojn en tiuj lernejoj, sed la publi-ka interesiĝo ne kreskis pro tio. Male, la indiferenteco restis totala. Mi memoras, ke iam mi disdonis centojn da flugfolioj en Lucerno kaj Zuriko (antaŭ la universitato) – neniu sin anoncis, se mi bone memoras. Tamen mia slavistika profesoro (Peter Brang) estis la sola, kiu interesiĝis pri la temo (verŝajne ĉefe en ligo kun L.N. Tolstoj kaj vegetarismo), tiel ke mi povis trakti ĝin kadre de mia dipomverkaĵo (aŭ licencia disertacio).

TC: Fakte la intereso pri historio kaj sociologio ĝenerale estas malgranda ĉie. Kiom da katolikoj demandas sin kiel formiĝis la dogmoj de la katolikismo? Kiu vere scias kaj interesiĝas kiom da damaĝoj kaŭzis la katolikaj misioj en la mondo “subevoluinta” ? Oni vidas nur la ideologian sinprezenton de la eklezio, kaj la (tamen ekzistantaj) valoroj de tiu misiado. La misojn oni ne vidas. Nur kelkaj homoj havas la kritikan emon kaj la intelektajn kaj kulturajn ilojn por alfronti ankaŭ tiun ĉi demandon.

9

AK: Tazio, en 1997 vi forlasis grandparte viajn funkciojn en la Eo-movado, ĉefe pro profesia trookupiteco, sed ankaŭ pro kreskantaj duboj rilate la evoluon de Eo, ĉu ne. En kiuj konkretaj konsideroj konsistis tiuj duboj?

TC: Mi ĉiam laboris eĉ tre intense (kaj senpage) por atingindaj sociaj celoj. Por substanc-dependuloj,⁹ por hazardludo-dependuloj, por aŭtismaj infanoj, por reformo de la psikiatria flegado, por defendo de infanaj rajtoj. Ne abstrakte, sed ĉiam en difinitaj projektoj. Esperanto estis unu el tiuj celoj (projektoj). Sed nun mi opinias, ke la esperanta celo ne atingiĝos. Do mia klopodo en tiu kampo ne plu estas necesa kaj utila.

10

AK: En via ampleksa konkluda studo titolita *Ĉu Eo postvivos la jaron 2045* (Bellinzona 1/1999, 2/2000) vi celis klarigi la kaŭzojn de la iompostioma ŝrumpo de Esperanto en okcidenta Eŭropo kaj de la signifo de la disvastiĝo de la angla lingvo internacie kaj en Svislando. Viajn konsiderojn vi detale kaj profunde priskribis en la nomita verko. Kiel vi karakterizis la staton de Eo aŭ de la Eo-movado en 2022, kaj kiel antaŭvideble ĝi statos do en 2045. Eble vi volus aldoni modifajn konsiderojn kompare kun la studo verkita fine de la 90aj jaroj.

TC: Mi estis (tre facile) bona profeto. Post 2000 ampleksiĝis kaj grandiĝis la evoluo de la kono de la angla lingvo en Svislando, la ĝenerala deziro lerni ĝin, kaj la postulo de labor-donantoj koni ĝin. Ankaŭ la deziro de la gepatroj (kaj de la lernantoj) lerni la anglan fariĝis ĉiam pli intensa. Tio signifas, ke malaperas nia alvoko al tia internacia funkcio por Esperanto. La svisoj rimarkis, ke Esperanto ne utilas tie, kie la solvo jam ekzistas kaj estas utiligata ĉiutage kaj ĉiuloke.

En la svisaj universitatoj, parto de la lekcioj kaj seminarioj okazas jam angle. Se vi volas enmatrikuliĝi en itala universitato, vi devas atesti, ke vi atingis certan nivelon en la scio de la angla. Preskaŭ ĉiuj medicinaj fakrevuoj en Svislando aperigas artikolojn (nur) en la angla. Multaj medicinaj fakasocioj en Svislando utiligas nur unu lingvon, nome la anglan. Iom post iom ankaŭ la psikiatria fak-asocio tion enkondukas. Nuntempe eblas en faka kunveno aŭ kurso, proponi anglalingvan prelegon sen traduko al la germana aŭ al la franca. Eĉ en la Konfederacia laboro. En multaj fakgrupoj, kiuj laboras sur bazo interkantona, nur la angla estas komuna!

Do la internacia lingvo fakte jam ekzistas. Temas pri la angla. Male, Esperanto ne estas utila en la praktiko, nome en la ĉefcelo, por kiu ĝi estis elpensita far Zamenhof. Laŭ mi Esperanto fakte neniam havis ŝancon fariĝi mondlingvo. La enkonduko de tiu (nova) lingvo estus tro multekosta. La angla bone taŭgas por la nuna utiligo. Kaj montriĝis, ke en la moderna Eŭropo la angla ne forigis la naciajn lingvojn. Kvankam en la grandaj bankoj kaj entreprenoj, kaj en la universitatoj, la rolo de la naciaj lingvoj malgrandiĝis tiukampe. Certe, niaj lingvoj fakte akiras ĉiutage “novajn” anglajn vortojn, sed tio okazis ankaŭ dum la regado de la franca lingvo, en la 18-a jarcento. Do la angla jam nun estas *la* internacia lingvo. Tamen ne la usona aŭ la GB-angla, sed la angla, kiun vi aŭdas en stacidomoj, trajnoj, flughavenoj, internaciaj hoteloj kaj internaciaj junularaj kunvenoj. Oni aŭdas

⁹ Klarigo: Ĉe la substanc-dependeco ludas rolon forta avido konsumi apartan substancon. Ekzistas pluraj formoj de substanc-dependeco, plej ofte ligitaj kun alkohola kaj medikamenta dependeco.

multajn erarojn, kaj samtempe la elparolo estas nek GB- nek uson-stila. Ĝi pli similas al la hind-angla parolmaniero (sed malpli rapida).

Mi povas facile imagi, ke baldaŭ ne plu estos necese lerni la anglan, eĉ ne por paroli aŭ skribi ĝin. Jam nun ekzistas aparatetoj, kiuj rekte tradukas de la angla al la itala kaj inverse. Ankaŭ la parolatan lingvon. Tio liberigos la homojn de la devo lerni lingvojn. Ankaŭ la anglan. Sub tiaj kondiĉoj ankaŭ Esperanto povos fariĝi internacie neutila, sed tamen ja resti lingvo en kiu vi povas revii, skribi, imagi kaj diskuti kun “samideanoj”. Precize kiel nun – sen la balasta internacia ideologio. Sed eble tio okazos nur kiam alvenos la Tago de Sankta Neniamo.

Esperanto malaperas ankaŭ pro aliaj kaŭzoj. Ĉefmotivo de Zamenhof (kaj de aliaj esperantistoj) estis la kredo, ke plurlingveco kreas konfliktojn. Tio montriĝis malvera. Konfliktojn kaŭzas aliaj meĥanismoj. La lingvo fojfoje servas por kovri la veran kaŭzon, sed tio neniam estas vera kaŭzo.

Cetere, rilate la verketon *Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045* en la ĉina radio esperantlingva mi aŭdis, ke tiu libro reprezentas danĝeran atakon kaj perfidon al Esperanto. Nu: ekskomuniko, en scienca kunteksto, konsistigas neakcepteblan sintenon.

AK: Nu, verŝajne oni eĉ ne devus esti ĉino (de Radio Pekino) por fari al vi tian riproĉon. Probable sufiĉus esti averaĝa fanatika finvenkisto, svisa aŭ itala, kiel tiu tipo abundas en la UEA-movado.

11

AK: Do se la internacia lingvo estas la angla, ĉu entute ankoraŭ necesas disvastigi Esperanton?

TC: Mi opinias, ke indus ne plu disvastigi Esperanton. Indus, male, savi la ĝisnunan laboron faritan, kaj inde enmuzeigi ĝin. Ĝi estas bela ekzemplo de la bonaj "solvoj", kiujn la homoj trovas kaj sekvas, kiuj tamen NE fariĝis portantaj por la estonteco, ĉar alia solvo alvenis, kaj fariĝis plej uzata (kaj tial tre utila). Investo por lerni lingvon DEVAS garantii valoran repagon (avantaĝon) al la lerninto.

12

Pri plurlingveco, kiu laŭdire kreas konfliktojn, vi tute pravas. Ankaŭ mi ofte atentigis pri tiu baza krederaro de la e-istoj. Mi ŝatus aldoni komenton. Plej verŝajne ne la lingvoj mem, sed aliaj kaŭzoj (kulturaj, religiaj, politikaj, sociaj) kulpas pri konfliktoj. La problemo estas, ke tiuj konfliktoj, aŭ iliaj kaŭzantoj, “uzas” certajn lingvojn. En la tempo de Zamenhof temis precipe pri rusoj (aŭ rusaj naciistoj aŭ ruslingvanoj), aŭ poloj (aŭ polaj naciistoj aŭ pollingvanoj). Do temas pri esenca miskompreno pri la kerno de la afero.

Povas esti, ke en la lastaj jardekoj en UEA oni komprenis tion kaj iom reviziis la eksteran retorikon de la ideologia kaj praviga aliro en la propagando, ekzemple dirante, ke Esperanto celas helpi la pluivadon de minacataj (ekz. indiĝenaj) lingvoj. Konkrete tiu ideo sonas tiel en koncerna komunikado de UEA okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo: „En la Tago de la Gepatra Lingvo, Universala Esperanto-Asocio festas la kulturan kaj lingvan diversecon de la mondo. Tiu diverseco estas riĉaĵo, kiun ni devas protekti kaj antaŭenigi. Respekto al lingva diverseco estas vojo al plena observo de homaj rajtoj.” Ktp. En simila komunikado TEJO „substrekas la valoron edukan, kulturan, identecan, komunikan kaj socian de denaskaj lingvoj, kadre de demokratiaj kaj daŭripovaj socioj,” kaj „Tial, konsciigi kaj agadi por valorigi niajn lingvojn kaj ilian liberan, daŭripovan uzadon estas konstanta klopodo de la Esperanto-movado, interalie de TEJO.”¹⁰ Simile sonas aliaj komunikadoj okaze de aliaj similtaj “Internaciaj Tagoj” proklamitaj de UN aŭ Unesko. Persone mi ne certas, ĉu UEA kaj TEJO skribas tiajn komunikadojn pro vera konvinko pri la afero, kiun ili alvokas, aŭ ĉu

¹⁰ Vd. [Mesaĝo de UEA al UN kaj Unesko okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo - La Ondo de Esperanto](#) [La Ondo de Esperanto \(sezonoj.ru\)](#) kaj <https://www.tejo.org/de/mesago-de-tejo-okaze-de-la-internacia-tago-de-la-gepatra-lingvo>.

temas nur pri sloganoj nur por “plaĉi” al Unesko. Krom tio mi ne kredas, ke devus esti la celo de la Eo-movado „protekti kaj antaŭenigi lingvan diversecon” (tio cetere estas rekta kontraŭdiro al la celaro de Eo) aŭ „valorigi niajn lingvojn kaj ilian liberan, daŭripovan uzadon” k.s. Unue al la Eo-movado mankas la faka kompetenteco, resursa kapacito kaj financaj rimedoj por plenumi tiajn taskojn. Kaj due la ĉefa celo de la Eo-movado estas, aŭ devus esti, informi pri Eo, disvastigi, propagandi kaj instrui ĝin. Punkto.

Ankaŭ la fenomeno de la aŭtomata tradukado, kiu nun estas plene disponebla en la interreto en dekoj da lingvoj, estas revolucia. Mi ofte utiligas tiajn tradukilojn eĉ por kompreni tekstojn el lingvoj, kiuj estas komplete fremdaj al mi. Mi konstatis, ke la kvalito de la traduko ekzemple en la lingvoj germana, angla, rusa kaj eĉ Esperanto, kiujn mi plej ofte uzas, pliboniĝis – iliaj traduk-proponoj ofte estas surprize kaj perpleksige kontentigaj. Ĉar tiuj tradukiloj tamen ankoraŭ ne provizas nin per perfektaj rezultoj (ili fiaskas precipe kiam temas pri komplikaj frazkonstruoj kaj gramatiko), daŭre necesas havi solidan konon de fremdlingvoj, se oni volas atingi kontentigajn rezultojn. La aŭtomataj tradukiloj dume povas servi nur kiel helpo, apogo, faciligo.

Se temas pri diverslingveco kaj plurlingvismo, laŭ mi necesus konsideri la revenon kaj pli kaj pli fortan akceptecon de la plurlingvismo lige kun la renaskiĝo de la malgrandaj etnaj lingvoj, kiuj dum la koloniisma tempo kaj dum la sovetia periodo (antaŭe en tiu mondoparto mem okazis giganta rusa koloniisma procezo ene de vasta kohera teritorio, kiu devis esti konfirmita, protektita kaj defendita de la sovetiaj komunistoj) estis minacataj de elmortado kaj malapero (ankaŭ nun daŭre elmortas lingvoj, sed pro aliaj, diversaj kaŭzoj). Ekzistas diversaj modeloj de plurlingveco/ismo. En multaj landoj establiĝis esence jena (trilingva) modelo, kiu estas aplikata: regiona lingvo, landa (aŭ nacia) lingvo, internacia lingvo. En tiu kunteksto mi ĉiam mencias la ekzemplon de Uzbekio, kiu trafe montras tiun situacion, kiu estas oficiala en tiu lando: karakalpaka kiel regiona lingvo en la Karakalpaka aŭtonoma respubliko, uzbeka kiel tutlanda aŭ tutŝtata lingvo kaj angla kiel internacia lingvo. (Vi rimarkis, ke la rusa lingvo mankas en tiu piramido, kiel ĝi verŝajne malaperis el la hierarkio en ĉiuj ekssovetiaj respublikoj.) La Baltaj Ŝtatoj rigore revivigis kaj aplikas la estonan, latvan kaj litovan lingvojn kaj tiel povis savi ilin de la forpuŝado, degenerado, eliminado kaj elmortado kiel tio estis la kazo sub rusa kaj sovetia regadoj. La rusa lingvo fariĝis unu en la “ordinaraj” fremdlingvoj (kvankam en Estonio kaj Latvio vivas ĉirkaŭ 30% de rusoj (inkluzive de belorusoj kaj ukrainoj) kiel minoritato, kiuj parte “asimiliĝis” al la ĉefa etno, tamen ne perdante sian rusecon, kiun oni praktikas inter si, kvazaŭ private). Do la Baltaj Ŝtatoj decidis rezigni pri garantiado de la lingvo-aŭtonoma statuso por la ruslingva loĝantaro (kio ne plaĉis al homajtaj organizaĵoj kaj kolerigis Moskvon). Ĉiu “eksterlandano” (kaj esence temis pri rusoj, kiuj alvenis post la komenco de la sovetia okupacio), kiu volis fariĝi civitano de Estonio aŭ Latvio, tiu devis sukcese trapasi (fifamanan) lingvoekzamenon – ne ĉiuj rusoj (precipe maljunuloj, malkleruloj, malsanuloj) trapasis ĝin sukcese kaj tial restis senŝtatanoj (kun provizora “kompromisa” “pasporto”) kun malbona scipovo de la landa lingvo. Do jen kurioza ekzemplo de lingva problemo. En sendependa Ukrainio oni deklaris la ukrainan sola oficiala lingvo, eĉ en la plimulte ruslingvaj regionoj (kiu same ne ricevis aŭtonoman statuson), kio kondukis al esenca refortigo de ĉi tiu lingvo (dum Moskvo kriegis pri subpremado de la rusa lingvo kaj “genocido” kontraŭ la ruslingva popolo en Ukrainio). En Ukrainio la plimulto de la loĝantaro scipovas kaj la ukrainan kaj la rusan lingvojn (kiuj estas tre similaj sed tamen diversaj), same la tie vivantaj etnaj minoritatoj, do ia grava lingvoproblemo apenaŭ ekzistas. Tamen la aktuala rus-ukraina milito havas ankaŭ iun kuriozan lingvan aspekton, nome tiun, kiun mi aludis: la aserto de la Kremlo, kiu konsideras, ke en Ukrainio la rusa lingvo estas subpremata, persekutata kaj malpermesata, pro kio necesis protekti la ruslingvan popolon kaj reheimigi la ruslingvajn teritoriojn (kion Rusio faris, kontraŭ la reguloj de la internacia juro, kun Krimeo kaj nun kun aliaj regionoj de Ukrainio).

Certe en tiuj landoj – kaj mi revenas al la baltaj – pli malpli ĉiuj homoj (krom eble maljunuloj) parolas aŭ utiligas nun la anglan lingvon, sed tio tute ne signifas, ke ĝi forpuŝas/is la surlokajn etnajn lingvojn (kiel e-istoj fojfoje volonte asertas kaj ignoras la realan situacion). Kiel konate, sur

la britaj insuloj la keltaj lingvoj praktike malaperis el la publikeco, ĉar tie ili estis forpuŝitaj de la angla lingvo (kiel la germana lingvo iam forpuŝis baltajn kaj slavajn idiomojn en la koloniigita Oriento aŭ la retoromanĉan en Svislando), do tie ni havas alian situacion ol en aliaj landoj, kie la aŭtoktonaj lingvoj reale konserviĝis. Pri la krima subpremado de indianaj lingvoj kaj etnoj en Usono. Kanado, Aŭstralio ktp. ni tute ne parolu (iuj e-istoj uzis ĝuste tiujn ekzemplojn por argumenti). En Hindio (Bharato), kie vivas 1 miliardo 400 milionoj da homoj, estas parolataj pli ol 100 diversaj lingvoj, de kiuj 21 estas agnoskitaj de la konstitucio kiel oficialaj lingvoj, dum la hindia kaj la angla servas kiel oficialaj transregionaj lingvoj. La angla daŭre funkcias kiel lingvo en administrado, instruado kaj ekonomio. Do temas pri tute aliaj dimensioj ol en Eŭropo, kaj la angla daŭre okupas sian tradician lokon. Ĉu iu en Hindio plendas pri la laŭdira hegemonia rolo de la angla lingvo mi ne scias, kaj ne kredas (tiu ĉi abstrakta kritiko estas iom kurioza fenomeno ĉe okcidentaj intelektuloj, kiuj vivas en la akademia eburturo, kaj de radikalaj politikaj maldekstruloj, kiuj malŝatas kapitalismon, Usonon ktp. – ĝuste la Eo-movado allogis sufiĉe multajn reprezentantojn de tiaj tendencoj, eĉ en anglalingvaj landoj mem). Ĉu en Hindio la homoj “fuŝe” prononcas la anglan – verŝajne ankaŭ tiu demando ludas neniun rolon kaj interesan neniun. Por reveni al la trilingvisma modelo, oni povas mencii ankaŭ Finnlandon kun sia sveda/ lapona, finna kaj angla modelo – kvankam la proporcioj inter tiuj lingvoj ege diferencas kaj la finna probable superregas ĉiujn aliajn lingvojn. Alia kazo estas Svislando, kies lingva modelo estas tutmonde glorata, kaj kie ekzistas kvar oficialaj lingvoj esence disdivitaj laŭ kantonoj – germana, franca, itala kaj romanĉa. Nek la (alt)germana nek la angla lingvo ĝis nun sukcesis forpuŝi la multnombrajn svisgermanajn (aŭ alemanajn) dialektojn, dum en Francio kaj Italio, kiel konate, la franca kaj itala lingvoj plene forpuŝis praktike la malnovajn historiajn idiomojn (provencan, okcitanan, korsikan, sardan, bretonan) kaj dialektojn, kiuj iam abundis en Italio. Se ni parolis pri lingvo-ekzamenoj en Estonio, interkrampe mi volus aldoni, ke ankaŭ en Svislando (kie daŭre vivas ĉ. 2 milionoj aŭ 25% da homoj sen svisa ŝtataneco, ĉar ili ne petis aŭ ne ricevis la svisan civitanekon) petanto de la svisa civitaneco devas sukcese trapasi ekzamenadon fare de la komunumaj aŭtoritatoj, kiuj kontrolas, ĉu la koncerna eksterlandanda kandidato almenaŭ sufiĉe bone regas la lokan lingvon kaj estas integrita. Tiel la moderna “lingvoproblemo” (kaj lingvo-politiko) havas tute diversajn aspektojn kaj facetojn en la menciitaj (eŭropaj) landoj kaj rilatas precipe al la socia problemo de mizero kaj malriĉo, kiu povas esti esence ligita kun la malbona scio de la landa(j) lingvo(j) ĉe milionoj de enmigrintoj el Afriko kaj Azio, kio kontribuas, ke ili ofte vivas en tre malfacila situacio, fakte sakstrato, ne trovante pagitan laboron kaj aliĝon kaj integriĝon en la ĝenerala socio, formante paralelajn komunumojn kaj dependante de ŝtataj helpsubvencioj.

Cetere la elmortado de lingvoj povas esti ligita ankaŭ kun la elmortado de iuj indiĝenaj triboj aŭ komunumoj, kiuj fariĝis viktimo de la moderniga aŭ migra procezo aŭ kunfandiĝis kun aliaj triboj, kiel oni povis observi ekzemple en Afriko, Azio, Oceanio kaj Latinameriko. Aliflanke en Afriko iuj indiĝenaj lingvoj kiel la Svahila, Volofa, Haŭsa, Lingala, Kikongo, Joruba k.a. povis “karieri” kaj akiri la statuson de vaste uzataj oficialaj trafikaj lingvoj, de kiuj ĉiu havas propran interesan historion. En tiuj kazoj, tiuj lingvoj eĉ forpuŝis la iamajn koloniismajn lingvojn kiel la anglan, francan, portugalan – do okazis inversa procezo. La lingva situacio en la mondo do estas ege bunta kaj multe pli komplika, ol la e-istoj imagas.

TC: Mi preferus scii kiom da aliaj lingvoj paroliĝas en tiuj regionoj, kiu parolas kion kie, ktp. Eble ja ekzistas “nivelejo”, sed ili estas momentaj. Mi kredas je ili, kondiĉe ke oni proponis klarajn statistikajn studojn.

13

AK: En la UK Florenco (2006) iu esperantisto demandis min, kial vi “malaperis” el la movado kaj ĉu oni povas antaŭvidi vian reaparon. Kion vi faris post 2006 rilate al interlingvistiko?

TC: Mi faris plu nenion. Mi limiĝis dum multaj jaroj al la publikigo de recenzoj en *La Monda Lingvoproblemo*, ĝis kiam la ĉefredaktoro decidis ne aperigi iun mian recenzon, cetere pro lia propra problemo (li havis disputon kun la aŭtoro de la recenzota verketo). Mi tiam decidis ĉesigi mian kunlaboron. Mi limiĝis al la flegado de miaj intereso: Francesco Soave, svisdevenaj lingvo-projektoj, literaturo en Esperanto, Ido kaj Occidental. Kial ne? Mi forlasis propagandon, instruadon k.s., sed ĉiam interesiĝis pri historio kaj kulturo – i.a. de Esperanto kaj de aliaj planlingvoj.

AK: Mi havis similajn malagrablajn spertojn kun redakcioj de iuj Eo-gazetoj: En unua kazo oni ne aperigis mian artikolon favore al artikolo de alia aŭtoro, kiun oni samtempe petis verki pri la sama temo sen mia scio. En aliaj kazoj oni aŭ ŝanĝis erojn en miaj tekstoj aŭ prinitis ilin per la komento de la redaktoro, kompreneble ĉiam sen konsulti min kaj sen mia scio. Kompreneble oni ne povas toleri tiajn farojn.

Sed mi konstatis, ke vi aldonis al via verko *Per construire una lingua* esperantan tradukon.¹¹

TC: Krome, lige kun la planlingva okupo, mia intereso koncernas ankaŭ la situacion de CDELI en Svislando. Mi vidis la naskon de CDELI fare de Gacond en la 60aj jaroj (tie kunlaboris ankaŭ mia edzino Teresita dum kelkaj jaroj). Mi amas kaj la institucion kaj la enhavon de la institucio kaj ankaŭ la homojn, kiuj kreis kaj gvidis ĝin dum longa tempo.

En 1984 kaj 1989 mi organizis du renkontiĝojn pri interlingvistiko en La Chaux-de-Fonds kaj eĉ eldonis du libretojn kun la enhavo de la kunvenoj. Tria libreto enhavis pli postan renkontiĝon kun la Ido-aŭtoro Andreas Juste pri la Ido-kulturo. Mi esperis, ke tio daŭros, sed fakte, hodiaŭ tio iom mankas, malgraŭ la lecionoj de Gacond. Mi opinias, ke bibliografia centro kun gravaj dokumentoj ricevas sian rajton vivi nur, se ĝi kultivas publikecon. Do nur se ĝi aktivas en scienca branĉo. Libraro aŭ dokumentaro utilas, nur se homoj utiligas ĝin por verki librojn, studojn, lecionojn, artikolojn, ktp. Tio donas valoron al la material-kolekto. Certe gravas la intrinseka (ensistema) valoro de la kolekto, sed sur socia nivelo gravas la publikaĵoj, kiuj aperis dank' al ĝi.

Laŭ mi CDELI devus a) ligiĝi kun universitataj katedroj pri Esperanto kaj planlingvistiko, kunlabori kun centroj, kie interlingvistiko estas instruata fako aŭ kie oni laboras tiucele, fine kun oficialaj kaj profesie gvidataj interlingvistikaj arkivo-fakoj, t.e. aliaj bibliotekoj, kiel ekzemple Planlingva Kolekto en Vieno kaj Nacia Bavara Biblioteko en Munkeno; b) CDELI devus fariĝi centro, kie oni laboras per modernaj iloj; c) La katalogigita materialo devus esti rete konsultebla. Por tion fari estas necese okazigi eventojn, kiuj ne nur konsistu el instruado de Esperanto aŭ amika renkontiĝado kun kafu-mado, sed kiuj devus okazi kiel seriozaj sciencaj kunvenoj, kies rezultoj aperus ankaŭ en skriba formo kaj estus publikigitaj en la reto aŭ libroforme.

AK: Jes, mi vidas la menciitajn problemojn same. Kunlaboro okazis siatempe kun Herbert Mayer, sed la iama IEMW en Vieno, kiu nun nomiĝas “Kolekto por Planlingvoj”, estis modele reorganizita sub nova gvido kaj laŭ modernaj kriterioj kaj fizike eĉ troviĝas en alia loko (do ne plu en la Hofburgo, sed en bela palaco proksime de ĝi). La esenca demando ĉi-rilate estas, ĉu Vieno aŭ aliaj institucioj (kiel la fako de Ilona Koutny en Poznano) povus aŭ volus kunlabori kun CDELI, pri kio mi ne certas, ĉar mankas laŭ mi la bazaj kondiĉoj.

Laŭ mi CDELI maltrafis iri la vojon de Vieno aŭ la okazon establiĝi kiel oficiale agnoskita scienca instituto, kiu estas aligita al iu grava universitato aŭ biblioteko kun kantona aŭ tutsvisa (kaj per tio internacia) signifo, kun kiu ĝi integre kunlaboras. Sed ĉar en La Chaux-de-Fonds estis alia situacio ol aliloke, verŝajne ĝi eĉ ne havis la okazon kapti tian evoluon aŭ opcion, kvankam oni ja sendube pensis kaj parolis pri ĉi. Por demonstri la sukcesan integriĝon de iu iama privata instalaĵo en oficialaj strukturoj en Svislando mi volas menci la ekzemplon de la iama “Svisa Orienta Instituto” en Berno (kiu estis gvidata de Peter Sager, fanatika kontraŭ-komunisto, kompareble kun Ric Berger, fanatika planlingvano, kaj Claude Gacond, fanatika e-isto!). Post jardekoj kiel privata “Svisa Orienteŭropa

¹¹ La teksto estas elŝutebla sub https://www.taziocarlevaro.ch/dds_ling_storici.html.

Biblioteko” ĝi unue fariĝis filio de la Urba kaj Universitata Biblioteko de Berno kaj post nova reorganizado finfine integra parto de la Berna Universitata Biblioteko, restante publika konsultejo kun tre ampleksa libraro kaj dokumentaro, kiu estas prizorgata de du-tri pagitaj dungitoj.¹²

Permesu ankaŭ aldoni jenan komenton. Lige kun la sorto de CDELI ekzistas/is alia centra problemo, nome ke CDELI dum jardekoj restis tro forte ligita al la persona gvido de Claude Gacond, kun ĉiuj avantaĝoj kaj malavantaĝoj (sen tio CDELI verŝajne estus disfalta, ĉar la stabila longdaŭreco de la aktiveco de Claude Gacond – kiu disponis feliĉe pri forta sano – kaj kelkaj regulaj libervoluloj estis unika, kvazaŭ komparebla kun la longa regado de reĝino Elizabeto IIa.). Gacond ne estis (eburtura) akademia sciencisto (kiu eble necesus por puŝi tian instalaĵon sur science-akademie pli altan nivelon), sed multe pli pedagogo kaj socia aktivulo kaj organizanto, kio ja esence influis la trajtojn de lia agado kaj la karakteron de CDELI. Oni kritikis malprofesiecon, amatorecon kaj diletantecon, kio evidente ne estis evitebla, sed tion prijuĝu aliaj. Oni klopodu objekte vidi kaj pritaksi la aferojn. Laŭ mi oni faris kion oni povis kaj tion oni faris sufiĉe bone kaj sukcese (kvankam eble ne ĉiam sufiĉe efike), se oni konsideras la relative modestajn disponeblajn rimedojn. Ĉefe gravis la konstanta, seninterrompa kolekta, ordiga kaj katalogiga (aŭ bibliografia) laboro. Kaj ne ĉio dependis nur de Gacond mem. Povas esti, ke oni iom maltrafis la teknologiajn eblojn, kiuj prezentigis post la enkonduko de la komputiloj kaj de la interreto. Krom tio mankis oficiala budĝeto, kiu ekzemple ebligus dungi daŭre pagitajn kunlaborantojn (kio tamen okazis en iuj tempe limigitaj periodoj). Tiel CDELI grandparte dependis de libervolaj kunlaborantoj (kaj ofte de la kapitalo de privatuloj aŭ de Gacond mem, kiu private kaj dankinde investis sian monon). Ankaŭ la svisa kaj internacia Eo-movado ne havis la kapaciton por helpi per financaj rimedoj (kvankam CDELI faris seriozan propagandon por Eo), do CDELI grandparte dependis de si mem. Diskutoj pri kunlaboro kun diversaj Eo-organizaĵoj certe okazis, sed ne ĉiam estis fruktodonaj. Laŭ mia scio Gacond serĉis ankaŭ iun taŭgan posteulon kiel gvidanton, sed evidente tia persono ne estis trovebla. Por la planlingva movado tamen sendube estis granda ŝanco havi tian instalaĵon, kvankam oni eble povintus fari pli multe el ĝi. La scienca ekspluato estas relative magra, laŭ mi, ankaŭ la ekstera intereso kaj la intereso en la Eo-movado mem ne estis sufiĉe grandaj. Do la ĉefaj meritoj kaj danko iras al la adresoj de Claude Gacond kaj la direktoroj de la urba biblioteko, kiuj faris, ke CDELI povis ekzisti tiel longe. Se oni do volus verki la historion de CDELI, oni devus precize konsideri multajn faktojn kaj cirkonstancojn, kiuj eĉ ne ekzistas en la konscio de la homoj, ĉar ili ne konas la detalojn kaj realajn problemojn. Se do iuj aferoj aŭ pritaksoj devas esti vidataj alie ol menciite en ĉi tiu priskribo, aŭ se iu havas alian opinion, oni povas mesaĝi tion al mi kaj mi publikigos la komenton. Pro manko de konkretaj perspektivaj informoj estas malfacile antaŭvidi, kio okazos kun CDELI kaj ĝiaj arkivaĵoj. Necesas atendi por vidi kio okazos.¹³

Alia utila projekto, kiun oni estus povinta realigi kadre de CDELI, estus produkti kompaktdiskojn, kiuj enhavas la plenajn jarkolektojn de diversaj periodaĵoj (kiel ekzemple Detlev Blanke faris kun “der esperantist”, “Paco”, k.a.). Tion oni estus povinta fari ekzemple en la kazoj de “Svisa Espero” – “Svisa Esperanto-Revuo”, “Cosmoglotta”, “Progreso” kaj aliaj svisaj planlingvaj periodaĵoj – cetere (privatan) monon oni povintus trovi ĉiam. CDELI aktivis ĝuste en historia periodo, kiam ekzakte tiu teknologio estis aktuala kaj aplikata (sed hodiaŭ oni publikigas skanaĵojn en interreto kiel Vieno faras tion). Kaj pli frue oni devis mendi perpoŝte (multekostajn) paperajn fotokopiojn (sed la elektronikaj skanaĵoj menditaj en Vieno ne estas pli malmultekostaj!). Sed kiel dirite la CDELI-kunlaborantoj estis plene okupataj per akcepto, ordigo kaj katalogigo de la abunda materialo, kiun ili ricevis el ĉiuj direktoj, plus priservado de surlokaj konsultantoj, esplorantoj kaj vizitantoj, kio havis prioritaton kaj forprenis amasan tempon, dum por aliaj projektoj la tempo kaj

¹² Pri la datoj, kiam tiu procezo okazis, vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Schweizerische_Osteuropabibliothek (germanlingve).

¹³ En majo 2022 ekdeĵoris nova direktoro de la Urba Biblioteko La Chaux-de-Fonds (vd. <https://www.arcinfo.ch/neuchatel-canton/montagnes/la-chaux-de-fonds/joel-jornod-prend-la-tete-des-bibliotheques-et-des-archives-de-la-chaux-de-fonds-1158149>), kies sinteno pri CDELI dume ne estas konata. En oktobro 2022 estis anoncote, ke Claude Gacond “emeritiĝos” kiel direktoro de CDELI fine de ĉi tiu jaro kaj ke la situacio de CDELI estos “klarigita” okaze de la venonta Ĝenerala Asembleo de CDELI en februaro 2023.

kapacito evidente ne sufiĉis. Ke kelkaj maljunuloj ĉirkaŭ Gacond faris tion tiel fervore, longtempe kaj honorofice-senpage, vere estas admirinde, dankinde kaj unike.

Se oni parolas pri kunlaboro kun aliaj strukturoj, ankaŭ jena problemo estas notinda: Per kelkaj specimenaĵoj konsultoj laŭ konkretaj librotitoloj, kiuj probable troviĝas nur en CDELI, mi rimarkis, ke la kolektoj de CDELI mankas en la nova tutsvisa biblioteka katalog-sistemo <https://swisscovery.sls.ch>, kiu estas konektita kun alilandaj naciaj bibliotekoj (ekzemple Vieno), kiuj enkondukis same konstruitan elektronikan interretan bibliotekan katalogon. Tiu manko signifas, ke la arkivaĵoj de CDELI ne estas mendeblaj kaj prunteblaj tra tiu katalog-sistemo (laŭ mia memoro ili neniam estis – ankaŭ interbiblioteke – rete mendeblaj, ankaŭ ne en la tempo de RERO; tamen – parto de – ili estis almenaŭ konsulteblaj en ĝia retkatalogo, kio estis granda progreso kompare kun la surloka paperslipa katalogo, kiu pluekzistis paralele). Do se paroli pri kunlaboro, minimuma kondiĉo estus verŝajne, ke CDELI estus ligita kun la strukturo de la menciita svisa kaj internacia retkataloga sistemo. Ankaŭ la retujo www.cdeli.org, kiu faras tre diletantan impreson kaj ŝajne ekstagnis, kiam oni festis la 60-jariĝon de CDELI (en 2017), devus esti renovigita.

TC: Jam por eviti la riskon, ke la laboro de Gacond iam estos neniigita, indus pripensi kiel oni povus kunlabori kun aliaj institucioj. Konkrete: Necesus pripensi kaj decidi kien transloki la arkivaĵojn de CDELI, kaze ke ili ne povos esti konservitaj en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Por trovi taŭga(j)n solvo(j)n necesus diskuti kun kompetentaj personoj, kiuj estas ligitaj kun tiu demando kaj interesataj trovi taŭgan solvon.

Krom tio estus utile kunlabori kun LF-KCE.

AK: Sed la kunlaboro inter la gvidantoj de tiuj Eo-centroj ŝajnas esti malfacila, kiel montris la spertoj de la pasinteco. Tiuj aktivuloj malfacile eltenas kaj evitas unu la alian kaj volas mem regi en la propra kaĝo, sen enmiksiĝo de aliaj flankoj (kvankam oni daŭre palavras/is pri kunlaboro kaj toleremo). Solvon de tiu konflikto mi vidas nur, se aliaj, novaj (kvazaŭ neŭtralaj) personoj transprenus la gvidon de tiuj institucioj, nome homoj, kiuj ne estas ŝarĝitaj de pasintaj interhomaj tensioj, problemoj kaj konfliktoj. Lige kun tio mi ankaŭ opinias, ke devus aperi tute ali(spec)a, nova publiko en tiuj Eo-centroj, kiu enkondukus tute aliajn etoson kaj nivelon (intelektan, kulturen, lingvan) por elimini la sekteman etoson, kiu tie regas kaj similas al subkulturaj kondiĉoj.

Mi petas pardonon, ke mi jen kaj jen enŝovis iom lonĝetan komenton pri kelkaj traktitaj punktoj de ĉi tiu tem(ar)o. Nia intervjuo-dialogo donis la okazon al mi diversrilate esprimi personajn vidpunktojn kiel mi mem aktuale vidas la aferojn, kvankam mi situas komplete ekster CDELI kaj la Eo-movado, kaj povas servi kiel bazo por pludiskuti tiujn temojn.

14

AK: Nun mi proponas transiri al esence interlingvistikaj demandoj. Unue pri tio: La Eo-propagando volonte kutimas emfazi la lernfacilecon de Eo kompare kun nacilingvoj. Tio estas parto de la tuta (cetere ege dubinda) Eo-propagando. Estas ĝenerale konate, ke ekzistas diversaj niveloj de la Eo-scipopovo ĉe e-istoj. Unuflanke ekzistas t.n. “eternaj komencantoj”, kiuj eĉ post cent lecionoj kaj multaj jaroj da lernado – sub la gvido de kompetentaj instruistoj – ne superis la komencan nivelon. Aliflanke ekzistas individuoj, kiuj kvazaŭ majstre adoptis Eon kaj perfekte kaj tre klare regas ĝin (ofte pli bone ol la propra gepatra lingvo), lerninte ĝin ĉefe aŭtodidakte, – sed ili estas laŭ mi malmultaj kompare kun la ĝenerala averaĝa amaso de e-istoj, t.e. asociaj membroj (aktivaj kaj pasivaj) kaj kongresaj partoprenantoj, kies lingvonivelo, ĉu parola, ĉu skriba, estas iel meza ĝis kontentiga (aŭ akceptebla – eble ekzistas aliaj pritaksavortoj), malgraŭ iuj difektoj (cetere de jardekoj ĉiam samaj ĉe ĉiam samaj uzantoj). Laŭ mia observo bonaj parolantoj de Eo estas ofte homoj, kiuj estas lingve kaj eduke kleraj, talentaj kaj lingv(istik)e interesataj. Laŭ kiuj faktoroj kaj kriterioj do dependas, laŭ vi, la bona scipopovo de Eo?

TC: Mi opinias, ke strukture similaj lingvoj povas aspekti lernfacilaj. Kelkaj lernproblemoj tuj nas-kiĝas, se du lingvoj multe malsimilas strukture. Sed la sperto instruas nin, ke nelerneblaj lingvoj ne ekzistas. Do “facileco” dependas *nur parte* de la denaska lingvo de lernanto. Siatempe WJA Manders faris eksperimenton: Li analizis altan nombron da leteroj, senditaj de esperantistoj diverslandaj kaj tial diverslingvaj, kaj analizis la erarojn, kiujn li trovis en tiuj tekstoj. Indus refari tiun eksperimenton per nunaj metodoj kaj samtempe kontrastive (kompare) analizi la tekstojn ankaŭ en la origina lingvo de la skribinto.¹⁴

Cetere neniuj lingvoj estas “nature” facilaj. Malfacilaj estas ankaŭ similaj lingvoj. Por multaj homoj itallingvaj la franca estas “malfacila”, kaj oni aŭdas bone kiel ili misprononcas. Kial? Supozeble, ĉar la kapablo bone lerni lingvon dependas ne nur de la lingva simileco, sed ankaŭ de aliaj faktoroj. I.a. de la denaska kapablo bone lerni, b) de intensa stimulo perfekte scii, c) de la fido en si mem, d) de la ebleco lerni en tre juna aĝo, e) de la aktiva helpo kaj aprobo de amikoj kaj gepatroj, f) de la instrumetodo plezure eduka, g) de la bezono por garantii sian vivon. Ktp.

AK: ... kaj de la motivacio kaj neceso, finfine bezono kaj utileco, kiel vi mem nomas ĝin (vd. ankaŭ respondon 14.

15

AK: La Esperanto-propagando volonte fanfaronas pri tio, ke la internacia lingvo Esperanto estas tre utila pro siaj **simpleco** (aŭ **facileco**), **reguleco**, **precizeco kaj logikeco**, aliaj asertoj krome estas **riĉeco**, **internacieco** kaj **beleco**. Laŭ mi temas pri esence sloganisma propagandismo, lanĉita kaj trudita de la Eo-movado por pli avantaĝa komerca “vendado” de la propra produkto, sen scienca kredindeco, ĉar la lingvorega (aŭ lingvoscipova) realeco ĉe la uzantoj de tiu lingvo aspektas ofte tute alie. Kritikantoj de Esperanto cetere kontestis, ke Esperanto estas NUR simpla (aŭ facila), regula, preciza, logika, sufiĉe internacia kaj vivanta lingvo. Ke Esperanto estas ne nur facila lingvo, pruvas la amaso de e-istoj (verŝajne la plimulto), kiu fuŝe, malbone kaj erare parolas kaj skribas Eon. Kompreneble la Eo-movado krude prisilentas tiun fakton en la propagando. Kiu do estas via (kritika) pozicio koncerne la asertitajn trajtojn de la lingvo Esperanto, kaj kiel oni povus fari lingvajn plibonigojn por faciligi ĝiajn lernadon kaj uzadon?

TC: Jen demandoj malfacile respondeblaj, ĉar por koncernaj respondoj mankas parametroj. Ni malhavas ilin, ĉar la kampo, kiun kovras tiu demandaro, estas grandega. Ekzemple “facila” indikas rilaton inter minimume du fenomenoj, nome homo kaj lingvo. Sed ja, eĉ se nur du, la unuopaj fenomenoj estas siavice tre kompleksaj. Tio signifas, ke la rilatoj inter tiuj diversaj fenomenoj kaj subfenomenoj varias, laŭ la kampo, kiun ni pritraktas.

Laŭ la detaloj la unuopajn aspektojn de la demandoj mi povas respondi jene, kvankam ne komplete kaj nur hipoteze:

Enkonduke, Esperanto estas simpligita hindeŭropa lingvo, kun iuj okcidenteŭropaj trajtoj (i.a. la artikolo) kaj kunmetsistemo certe pli racia ol tiu, kiun ni trovas ĉe hindeŭropaj lingvoj, ĉar ĝi estas parte aŭtonoma. En tio ĝi iom pli similigas Esperanton al la lingvoj sintezigaj (aŭ aglutinaj), kvankam je modera nivelo. Ankaŭ la gramatiko kaj la sintakso estas esence hindeŭropaj, sed ambaŭ kategorioj estis forte reguligitaj.

Tiurilate, ekzemple por itallingvano, Esperanto estas pli facile (kaj pli rapide) lernebla kaj pli facile utiligebla, ol la rusa aŭ ĉina. Aliflanke, por ĉino aŭ ruso Esperanto estas supozeble same pli facile lernebla kaj utiligebla ol la germana aŭ la hispana.

Tion mi skribas, sen havi pruvojn. Temas pri hipotezoj. Estus necese konstrui eksperimentojn por verifi la supre indikitajn tezojn. Mi mallonge detaligu la kompleksecon de la demando. Se

¹⁴ Vd. kontrastivan (komparan) lingvistikon.

“facileco” implicas rilaton inter du lingvoj, kaj la kapablojn de homoj, la rilato esprimiĝas plej bone en difinitaj kampoj, kiuj koncernas la lernanton *kaj* la uzanton.

Ĉe la prikonsiderendaj elementoj de “relativa facileco”, respektive “malfacileco”, necesas distingi:

a) *Individuaj lingvo- kaj komuniko-celaj aspektoj*. Kiu estas la deir-lingvo kaj kiom bone iu homo regas ĝin.

Estas konate, ke unulingva homo frontas malfacilaĵojn, kiam li/ŝi lernas lingvon, en matura aĝo. Infanoj lernas lingvon tre facile, sed la kapablo lerni ĝin senprobleme perdiĝas inter la 14a kaj la 21a aĝjaroj. Tamen ne komplete, ĉefe se oni ekzercis la lingvon antaŭ ol la kapablo malaperis. Kaj dulingvuloj ĝenerale havas avantaĝojn lerni plurajn, aŭ pluajn lingvojn.

Lerno kaj uzo-nivelo de Esperanto: Ni supozu, ke germanlingvano lernis Esperanton kaj intencas utiligi ĝin. Oni ja difinu, kion signifas “lerni”, kaj oni difinu, kiel oni mezuros la uzo-kapablon akiritan. “Lerni” estas ja ankaŭ temo de deziro, ambicio, projekto, ne nur de unuopa kapablo. Plue, neniu lernas ĝis absoluta perfekteco. Ĝenerale ni celas certagradan nivelon. Ankaŭ kiam ni volas lerni Esperanton.

Unu (aŭ maljuna) homo, kiu lernas Esperanton, bezonas ĉ. 5 jarojn, por supervidi (mallonge) la tuton. Kaj poste, aŭ forlasi, aŭ fariĝi adepto aktiva. Plej granda parto malaperas, kompreneble. Sed ja, la ĉefbazo, la kredo pri internacia lingvo “neŭtrala”, forvaporigis.

Kiugrada formala lernejo-eduko: Bona lerneja eduko, kun akurata kono de la propra lingvo, ĝenerale helpas lerni lingvon. Malfeliĉe, la mezlernejoj ne instruas bone *prononci* kaj ne montras kiel funkcias la spiro kaj la muskoloj de la buŝo kaj de la kolo, kiam oni prononcas lingvon.

Por kiucela uzo: Oni lernas lingvon pli facile kaj pli rapide, se oni *bezonas* ĝin aŭ profunde interesiĝas pri ĝi. Cetere, uzo de lingvo dependas ankaŭ de la celo. Bontagulaj esperantistoj lernas minimuman lingvon por minimuma celo. Diskuti pri scienco aŭ literaturo postulas bazajn sciojn. Ankaŭ se vi tion volas fari en Esperanto.

b) *Pure lingv(istik)aj aspektoj*. Skribo: La skriba aboco (alfabeto) de Esperanto estas malfacile utiligebla. Ĝi reprezentas malhelpon kaj kroman lerno- kaj uzo-malfacilecon. Malfeliĉe Zamenhof inventis specife esperantajn skribliterojn. La Ido-skribo estas pli facile lernebla kaj deĉifrebla. Fonologio: Esperanto estas lingvo kun tro multaj *necesaj* fonemoj. Ido estas multe pli spartana kaj tial pli facila, el tiu vidpunkto. *Suma* estas supozeble la plej “facila” planlingvo, el fonologia vidpunkto. Do lerni Esperanton estas relative malfacila afero por plej multaj homoj. Tio montriĝas ankaŭ je nivelo de la prononco, kiu ne ĉiam estas kontentiga. La solaj, kiuj preskaŭ “nature” elparolas Esperanton, estas kroataj aŭ serbaj denaskuloj, malgraŭ etaj nacilingvaj influoj, kiuj ne estas eviteblaj (vd. ekzemple Lapenna, kiu kvazaŭ perfekte prononcis Eon). Gramatiko: La gramatika strukturo de Esperanto estas tipe okcident-eŭropa. Do ĝi estas relative facila por okcident-eŭropanoj. Fakte la *artikolo* estas problemo por slavoj, kaj la distingo inter *sia* kaj *lia*, *ŝia*, *ĝia*, *ilia*, estas certe komplikaĵo por ĉiuj. Ankaŭ la *participa strukturo* en Eo estas komplika, kaj mi demandas min, ĉu la *pasi-vaj formoj*, pezaj kaj kompleksaj, indus revizion en la Ido-direkto. Sufiĉe malfacila, ĉefe en la aktiva uzo, estas ankaŭ la principo necesa distingo inter *nominativo* kaj *akuzativo*, kiu kaŭzas multajn konfuzojn kaj erarojn, supozeble ankaŭ al homoj, kiuj parolas lingvon kun deklinacio, ĉar la uzo de la Esperanta akuzativo ne ĉiam kongruas kun la ĝenerala uzo en la eŭropaj akuzativo-havaj lingvoj. Vortordo (sintakso): La sintaksa strukturo de Esperanto kongruas kun la ĝenerala strukturo en hindeŭropaj lingvoj. Mi ofte demandis min, kiomgrade parolanto de alte-aglutinaj nord-amerikaj lingvoj lernas facile Esperanton. Kaj inverse, kiel facile lernas tian lingvon homo, kiu scias Esperanton. Intuicie mi supozas, ke ĉi-lastata eble jes pli facile lernas tian lingvon, ĉar esperantano povas pli facile analizi la kunmetan sistemon de tiaj alte-aglutinaj lingvoj, sed ja temas pri nura impresoj, sen faktaj pruvoj. Vortkonstruo: Esperanto konstruas vortojn pli regule ol en la hindeŭropaj lingvoj, sed tamen ne tiel ekstreme kiel tio okazas en alte-aglutinaj nordamerikaj lingvoj. Ĝi paŭzas la hindeŭropajn lingvojn kaj iomete ankaŭ la vortkonstruon, kiun ni konstatas en

la turka aŭ hungara (ekz. “mal-san-ul-ej-an-in-et-o-j-n”). Ĝi estas regula sed sen la t.n. “vokala harmonio” de la menciitaj du lingvoj. Tio estas interesa aspekto, kiu tamen ludas nur marginan rolon en la parolo, kompare kun la menciitaj aglutinaj lingvoj, ĉar, dumparole, nur malofte ni “konstruas” vortojn. Ĉar, ĝenerale, ni utiligas “jam konatajn” konstruitajn vortojn.

Supozeble eblus pli certe alfronti tiujn demandojn, se ni deirus de la provoj de W.J.A. Manders, kiun mi ankoraŭfoje volas mencii en ĉi tiu okazo. Li ekzamenis aron da esperantlingvaj leteroj senditaj de pli-malpli kompetentaj Esperanto-uzantoj. Per tiu ekzameno li malkovris kelkajn el la tiklaj punktoj de Esperanto. Certe, unue oni devus kolekti amason da leteroj skribitaj far de Esperantistoj, kiujn ni ankaŭ devus precize koni kaj enkadrigi (laŭ aĝo, sekso, lernejo-nivelo, denaska lingvo, kromaj lingvo-konoj). Se la letero-kvanto estus sufiĉe granda, eblus konstati, ĉu miaj hipotezoj estas ĝustaj aŭ ne, kaj tiam eblus ankaŭ eventuale precizigi ilin.

AK: Se paroli pri relative facilaj nacilingvoj romanaj, ĝermanaj, slavaj kaj finnugraj, laŭ la kategorioj supre menciitaj, mi nomus en tiu vico la katalunan, norvegan, slovenan kaj estonan, kiujn mi konas pli-mapli supraĵe kaj kiuj faras (al mi) la impreson de simpligitaj hispana, sveda, serbkroata, finna lingvoj, sed mi eble maltaŭge esprimiĝis (kaj ofendus la koncernajn etnajn lingvo-uzantojn, ĉar probable la parolantoj kaj posedantoj de tiuj lingvoj ne deziras, ke oni nomu iliajn idiomojn, kiuj estas tute memstaraj literaturaj lingvoj kaj ne dialektoj, simpligitaj formoj de iuj aliaj – parencaj – lingvoj). Sed mi celis atentigi pri la kriterio de la lernfacileco ĉefe laŭ la kategorioj de la gramatiko, skribo kaj fonetiko. Eble tiuj lingvoj povus servi kiel bazo por “ĝenerala komuna planlingvo” por la koncerna lingvofamilio. Interese estas konstati, ke ĉe tiuj lingvoj temas senescepte pri “malgrandaj” (laŭ la relativa kvanto de parolantoj), kompare kun la “grandegaj” nacilingvoj kiel la franca (aŭ hispana kaj portugala), angla kaj rusa, kiuj estis kvazaŭ truditaj al la homaro, kvankam ili estas malfacilaj. Pri la ĉina, araba, turka (inkluzive la similajn “versiojn” azera, kazaha, turkmena, uzbe-ka, krigiza, k.a.) kiel “regionaj mondlingvoj” ni tute me parolu, kvankam ŝajnas, ke ili estas pli facile lerneblaj kaj adopteblaj por iuj popoloj de la koncernaj (aziaj) regionoj ol la hindeŭropaj lingvoj, ĉar ĝuste en tiuj mondregionoj dominas tiuj lingvoj kaj ne romanaj aŭ ĝermanaj. Kio koncernas la aluditajn nordamerikajn lingvojn, la *inuktituta* lingvo, kiu estas la makrolingvo por la *inuitaj* idiomoj kaj -dialektoj de la eskimaj indiĝenoj de Kanado, kaj kiu estas parolata ankaŭ en Gronlando. Rigardu iun gramatikon aŭ koheran tekston en tiu lingvo kaj mem imagu, ĉu averaĝa esperantisto pli facile lernus kaj adoptus tian lingvon, malgraŭ ia (teoria aŭ eĉ praktika) avantaĝo de la aglutineco kaj sintezeco de Eo, al kiu tia e-isto estas alkitimita. Mi mem forte dubas kaj opinias, ke ni ne supertaksu tian eksterordinaran kapablon ĉe e-istoj (des pli ke mi mem konas neniun tian ekzemplon aŭ kazon). La kialo ĝuste situas en la de vi aludita cirkonstanco, ke ni nur malofte “konstruas” vortojn laŭ “klasika” aglutina modelo (kiel en la finna, hungara aŭ turka). Krom tio ni tro firme pensas nacilingve. Sed necesus demandi finnojn, hungarojn, estonojn kaj turkojn, kiel ili “pensas”, kiam ili konstruas vortojn kaj frazojn en Eo. Kvankam mi agnoskas certagradan aglutinan karakteron de Eo, mi ĉiam avertis ne supertaksi ĝian gravecon, des pli ke ne estas konate, ke Zamenhof uzis modelojn de klasikaj aglutinaj lingvoj, kiujn li ne konis. Ĉe la kunmetaĵoj li orientiĝis laŭ la slavaj lingvoj, ĉefe rusa, kaj la germana, kiujn li plej bone konis.

16

AK: Ĉu laŭ vi Eo do estas vere pli facile lernebla ekzemple por azianoj (ĉinoj, japanoj, koreoj) ol ekzemple la angla, sendepende de la prononcaj aŭ fonetikaj malfaciloj, aŭ ĉu tio estas mito, kiun ekzemple Claude Piron enkondukis, idealigis kaj troigis?

TC: Mi ne scias tion. Claude Piron ne troigis, certe, ĉar la malfacilaĵoj, kiujn li indikis, fakte ekzistas – cetere ja se vi lernas iun ajn lingvon, ĝuste, ja, ankaŭ Esperanton.

AK: Necesus demandi azianojn...

AK: Se ni parolas pri Piron, en lia verko *Psikologiaj reagoj al Esperanto* (1988) li faris plej diversajn asertojn, kiujn oni povus nomi spekulativoj. Kiu estas via ĉefa kritiko de liaj opinioj kaj asertoj?

TC: Piron estis psikologo, kiu profunde kredis je la misio de Esperanto kaj de la Esperanta movado. Sed supozeble li ne ĝisfunde okupiĝis pri socia psikologio. Li tre bone indikis kelkajn aspektojn de la por- kaj kontraŭ-esperantaj argumentoj. Sed li ne rimarkis, ke la argumentoj ne konvinkas la homojn. Konvinkas onin nur la utiligo (kaj tial la utileco) de lingvo. Por lerni Esperanton mi “elspezas” monon, laboron, tempon. Samo koncernas la anglan. Kion mi gajnas per tio? Per la angla multe pli ol per Esperanto. Ekzistas esceptaj homoj, sed ili estas malmultaj. Ekzistas homoj, kiuj deziras lingvon utiligatan *nur* en malgranda grupo, kaj Esperanto tiukaze reprezentas interesan akiron. En la libroj de Piron vi facile malkovras, ke multaj liaj argumentoj koncernas ĉefe lin mem kaj lian etikan vidpunkton.

AK: Sama demando pri la libro *La bona lingvo* (1989¹⁵) de Claude Piron. Kie liaj asertoj estas kredindaj kaj kie li eventuale troigis, fantaziis, spekulativis?

TC: Temas pri malnova demando. Kaj respondoj al tiu demando ne ekzistas. Kion signifas “bona germana lingvo”? Mi ne scias. Tio dependas de la socia aparteno de la koncerna individuo, de liaj celoj, de lia kultura bazo. Estas konate, ke la lingvistoj volas nur ekzameni kiamaniere la homoj en iu socio parolas. Male pedagogoj volas influ la uzon de la lingvo ĉe la lingvanoj. Iliaj modeloj estas ligitaj al la epoko kaj al la celoj de tiuj pedagogoj. La lingvistika esploro estas scienca entrepreno. La pedagogia influo estas kultura entrepreno, kie nur la pedagogio havas sciencan aspekton. Sed ne la celon mem de la pedagogo.

AK: Se paroli pri Esperanto-misiado, lingvistikaj sciencaj esploroj kaj pedagogiaj taskoj, ni eble devus paroli ankaŭ pri propagando. Mi celas atentigi pri jenaj cirkonstancoj:

Post la publikigo de la Svisa Enciklopedio Planlingva, per kiu mi plenumis grandparton de la celita esplorlaboro, mi jam ne plu tiom sentis la bezonon konsulti la kolektojn de Eo-bibliotekoj, i.a. CDELI. Kial? Mi venis al la konkludo (jam antaŭe), ke preskaŭ 100% de planlingvaj kaj esperantistaj eldonaĵoj konservitaj en tiuj arkivoj konsistas el pozitiva raportado kaj fanatika propagando (disvastiganta la legendojn pri la supereco de planlingvoj kaj graveco de la propra afero) kaj ke mankas en tiuj publikaĵoj la alternativa (mem)kritika aliro, sinteno aŭ spirito, kiu estus necesa por (pli) kritike aŭ objektivite studi kaj trakti la planlingvan demandon. Lige kun tiu tro unuflanka fonta stato mi vidas la danĝeron, ke novaj (junaj, entuziasmaj kaj senciaj) esplorantoj trovas en tiuj planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj esence nur tiun pli malpli ĉiam saman (grandparte arkaikan, eksaktualan) materialon (verkitan de pli malpli samaj aŭtoroj), kiu grandparte baziĝas sur subjektivaj opinioj, asertoj, priskriboj kaj konkludoj de la planlingva demando, kiujn tiuj esploristoj tro facile remaĉas en siaj disertacioj, eble en kombino kun aliaj temoj kaj konsideroj. Tiel tiuj sciencaj verkaĵoj kaj iliaj aŭtoroj iusence mem riskas fariĝi parto de la anakronisma planlingva kaj Eo-propagando. Krom tio, grandparto de la “klasika” planlingva kaj Eo-fakliteraturo post la dua mondmilito aperis en komunismaj landoj (de orienta Eŭropo) kaj estis inspirita de marksismaj kaj materiismaj paradigmoj, kun tabuoj, prisilentoj kaj preterlasoj. Do kritikaj objektivaj argumentoj, kiuj devus esti konsiderataj en tiaj sciencaj verkoj, preskaŭ komplete mankas en tiu literaturo (ĝis hodiaŭ oni daŭre sistemece listigas en bibliografioj certajn malnovajn verkojn de Detlev Blanke, Vilmos Benczik, Ulrich Lins, Ivo Lapenna, A. Korĵenkov k.a., kiuj unuflanke kaj malkritike traktis Eon kaj ĝian movadon, dum verkoj de pli novaj kritikaj aŭtoroj komplete mankas). Do ĉe tiuj aŭtoroj vera objektiveco ne ekzistas, ĉar ili estas blindigitaj de la teorio pri la supereco de Eo (kiun

¹⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/La_bona_lingvo.

ili ja konsideras viktimo de Hitler kaj Stalin – sed ili ne kritikis la uzurpadon kaj misuzadon de Eo fare de la komunismaj reĝimoj post la 2a mm), kaj iliaj verkoj devas esti atribuitaj al la Eo-propagando. Ankaŭ Claude Gacond kaj ĉiuj ceteraj konataj publikaj aktivuloj kaj propagandistoj apartenas al tiu ĉi kategorio, ĉar ili senlime kaj fanatike adoris Eon, kies signifon ili komplete supertaksis, kvankam ĝi apenaŭ ludas/is gravan rolon en la historio de la homaro. Mi konas neniun (“ĝisostan”) e-iston, eĉ inteligentulo, intelektulo kaj tre kritikema persono, kiu kritikis Eon (en ajna rilato) en si mem, kvankam la samaj homoj ja eble kutimas kritikegi UEA-n, unuopajn facetojn de la Eo-movado, ĝian strategion aŭ unuopajn gvidantojn aŭ simile. La vorto “kritiko” estas kvazaŭ tabuita aŭ diskreditita en Esperanto. Sed sen kritiko kaj kritika sinteno progreso ne ekzistas, sed restas nur stagnado. Nu e-istoj, kiuj kritikis Eon, eble ne plu estus aŭ ne plu povus esti nomataj e-istoj. Sed tiuj e-istoj memorigas al mi ekzemple komunistojn, kiuj neniam kaj neniel aŭdacis aŭ kritikis la komunismon, socialismon aŭ marksismon-leninismon en si mem, sed ja kritikegis problemojn en la komunismaj partioj, unuopajn komunismajn gvidantojn, politikojn aŭ strategiojn. Sed ankaŭ religiaj movadoj konas tre kompareblajn sintenojn, kondutojn kaj mekanismojn.

Mi mem riskis fali en la kaptilon de la Eo-propagando, kiam mi verkis pri la temo, precipe en la komenco, kvankam mi kredas, ke mi ĉiam konservis mian kritikan menson kaj verkis kun distanco (kio ne plaĉis al ĉiuj). Mi neniam estis adepto de la “fina venko”. Ĉar la gvidantoj de la koncernaj planlingvaj bibliotekoj estas kutime mem ĝisostaj aŭ konvinkitaj e-istoj kaj Eo-propagandistoj, ili aldone helpas al tiuj (kompatindaj) esploristoj tro senkritike adopti (sektemajn) “narativojn” pri planlingvoj. Tiel funkcias sektoj.

Kaj tiel funkcias la reproduktado de la Eo-propagando, eĉ (pseŭdo)science bazite. En tio ŝajnas, ke la konsultado de eksteraj fakuloj kun pli kritikaj konsideroj kaj pritaksoj de la aferoj kutime estas evitataj. Ekscesa kulmino en la tuta ekzerco estas, kiam la opinioj de iuj Eo-stranguloj kaj -fanatikuloj kiel Parzival (Serge Reverdin), Didi Weidmann aŭ Mireille Grosjean fariĝas pli gravaj ol tiuj de fakuloj kun racia kaj kritika pensmaniero (kiuj kutime tute ne estas konsultitaj), ĉar la nomitaj aktivuloj estas pli konataj kaj funkcias kiel “oficialaj” reprezentantoj de la Eo-movado. Terure! Per idiotisma propagando la Eo-movado kaj Eo mem neeviteble ruinigas sin mem, laŭ mi, kun la konata rezulto.

Do oni povas demandi sin, eĉ dubi, ke tiuj fontoj ankoraŭ utilas nuntempe, krom por historiaj esploroj, kiujn iuj (naivaj) universitataj studentoj faras de tempo al tempo (kiel mi mem siatempe). La tuta planlingva kaj Eo-temo estas fora, eks-moda afero, kvankam la Eo-propagandistoj fanfaronadas, ke ilia afero estas ege aktuala, moderna, utila kaj grava (kvankam praktike neniu en la mondo parolas pri Eo). Kiom longe bibliotekoj estas interesataj konservi tiujn materialojn, estas malfacile diri – mi memoras kazon, kiam la universitata biblioteko de Zuriko siatempe forĵetis faskon da Volapük-libroj (el la 19a jarcento), kio laŭ R. Haupenthal nature signifis grandan katastrofon. Ĝis kiam la e-istoj do sukcesos konvinki la estrojn de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds teni CDELI estas nekonate.

19

AK: Do ĉu finfine eblus krei la idealan, perfektan lingvon laŭ la ideoj de Zamenhof aŭ de aliaj planlingvaj aŭtoroj, sed lingvon, kiu ne restus ligita al la roman(id)a sfero?

TC: La demando estas senresponda. La angla konservas sian bazon strukturan ĝermana kaj siajn francdevenajn vortojn. La demando pri la disvastiĝo de Esperanto ne koncernas ĝian vortaron, sed ĝian praktikan utiligon en la homa socio.

AK: Kio estas probable ĝia ĉefa merito kiel planlingvo.

TC: Mi konsentas kun vi. Sed la hodiaŭa superrego de la angla dependas de la historio de la angla lingvaj landoj, kaj de la koloniisma sistemo ĉefe brita. Usono, krome, estas la plej forta lando en ekonomia produkto, kaj tial ankaŭ en scienca produkto.

20

AK: Ĉu artefarite planitaj lingvoj povas atingi la nivelon de naturaj lingvoj, aŭ ĉu planitaj lingvoj restas pseŭdo-lingvoj?

TC: Ne ekzistas pseŭdolingvoj. Lingvo estas ilo, kiu permesas konstrui kaj esprimi koncepton, kiu tial povas fariĝi komuna posedo. Lingvo permesas kunligon kaj fajladon de la konceptaro. Do lingvo kunligas homojn. Ĝi permesas la konstruon de socio, de kulturo. Laŭ mi planlingvoj naskiĝas ja aliel, sed funkcias egale kiel la tiĉina dialekto, la franca, germana, haŭsa lingvoj. *Rumantsch grischun* (RG) ne estas pseŭdolingvo, kvankam kelkaj romanĉoj grumblas pri ĝi. Ili grumblas ne pro la fakto, ke ĝi ekzistas, sed pro la malatento al la lokaj idiomoj, kiuj ankoraŭ ekzistas kaj estas utiligataj en la praktiko. La Kantono (Grizono) decidis financi la instruadon en RG, sed ne en la lokaj idiomoj. Se RG fariĝus tutsvisa kaj bone konata en tuta Eŭropo, laŭ mi tiam neniu protestus. Ĉar, fakte, la flegado de la lokaj idiomoj flegas la lokan kulturon, la lokan ligitecon. Male la ĝenerala romanĉa lingvo estis kreita por simpligi la ŝtatajn taskojn. Ankaŭ inda celo, sed ĝi ne tuŝas la identecon de la vilaĝanoj, ĉar en RG ili ne kapablas identiĝi.

AK: *Rumanĉ griŝun* estas interesa komparo, al kiu oni donis tro malmultan atenton en la esperantista interlingvistiko – probable simple pro tio, ke RG ne tro koncernis la ideojn, aferojn kaj taskojn de Esperanto, kaj ĉar temis pri esence svisa afero. Laŭ mia memoro ĉefe Arthur Baur skribis pri ĝi en Eo-medioj, sed eble li ne tro intense komparis ĝin (lingvistike kaj laŭ funkcioj) kun Eo. Necesus relegi liajn ĉirilatajn verkaĵojn kaj eble denove okupiĝi pri RG.

21

AK: Kiu laŭ via pritakso estas finfine la plej sukcese kreita artefarita internacia planlingvo: Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue aŭ Occidental aŭ iu alia?

TC: Esperanto estis la plej sukcesa planlingvo. Kaj ĝi restas la plej sukcesa. Sed la sukceso iom post iom malaperas. Tion vi vidis bone ĉe Occidental, Interlingua kaj Ido. Ĉe Esperanto estas same. La aliaj ŝrumpis pli frue kaj pli rapide.

22

AK: La nacilingvaj influoj de diverslandaj e-istoj en la prononco de Eo estas, laŭ mi, granda problemo, eĉ ĝeno (kvankam tio estas ĝenerala problemo de la adopto de fremdlingvo). Kvankam la fuŝa (fonetika) elparolo de Eo eble povas esti konsiderata ĉefe kiel estetika problemo, ĝi tamen povas fojfoje konduki al komprenaj malfaciloj. Ekzemple ekzistas multaj tiaj ekzemploj kiel “ŝato” kaj “sato”, “libera” kaj “ribela”, “ĝuste” kaj “guste”, ktp. (certaj etnolingvanoj malfacile distingas tiujn sonojn). Eble ekzistas etnoj, kiuj pli “neŭtrale” prononcas Eon, ĉar ili havas malpli ekstremajn fonetikajn trajtojn en siaj lingvoj kiel laŭ mi ekzemple parolantoj de la kroata aŭ serba, norvega aŭ rumana lingvoj, eble eĉ alemanaj svisoj (se ili klopodas bone paroli ĝin), kompare kun francoj, angloj, germanoj, danoj, ĉeĥoj, hispanoj, hungaroj, poloj, rusoj, kiuj apenaŭ sukcesas ne nur forigi sian tipan “akĉenton”, sed ankaŭ la specifajn fonetikajn trajtojn de siaj lingvoj. Kutime oni facile povas deveni al kiu etno certa Eo-parolanto apartenas, se oni konsideras ankaŭ la intonacion kaj melodion de certa lingvo. Kelkoje oni gajnas la impreson, ke certaj e-istoj tute ne okupiĝas pri bona elparolado de Eo. Sed kion signifus “malfuŝa” aŭ ĝusta prononco de Eo? Zamenhof montris sin tolerema ĉirilate, kvankam li prezentis tute klarajn ekzemplojn kaj normojn de la modela prononcado de Eo.

Ĉu en Ido, Occidental kaj Interlingua ekzistas/is la samaj problemoj aŭ ĉu iliaj parolantoj pli “konscie” parolis tiujn lingvojn, kun pli granda prononca disciplino. Aŭ ĉu mankas sufiĉe da

empiriaj spertoj pro nesufiĉa nombro de diverslandaj kaj diverslingvaj parolantoj? Kiuj estas viaj ĉirilataj scioj, spertoj, observoj, supozoj, konkludoj?

TC: Jen problemo, kiu dependas de la fakto, ke oni ofte instruas vortojn kaj frazojn, sed oni ne ekzercas novajn kutimojn movi la langon, la spiron, kaj ĉefe fajli la aŭdkapablon. Mi rimarkis, ke ekzemple hispanlingvaj esperantistoj instruas Esperanton, sed ne priatentas la fuŝan elparolon de la lernantoj, ĝuste ĉar ankaŭ ili same elparolas fuŝe. Samo koncernas esperantistojn franc- kaj itallingvaj. Cetere, siatempe, en niaj lernejoj la francan kaj germanan instruis instruistoj itallingvaj, tiel ke mi mem akiris fuŝprononcon de la franca kaj germana lingvoj. Nur vivado unue en Zuriko kaj poste en Neŭŝatelo komprenigis min, ke mia prononco de la germana kaj franca ne estis nesufiĉe adekvata. Mi korektis mian fuŝprononcon. Nun ĝi estas, laŭ mi, sufiĉe akceptebla. Kompreneble tio postulas laboron. Sed fuŝprononco estas problemo universala ĉe lingvo-lerno.

AK: Fuŝa prononco de iu fremdlingvo (mi ne parolas pri la ĉina) neniam signifis problemon aŭ obstaklon por mi, ĉar mi rapide komprenis kiel oni devas “originale” prononci iujn lingvojn. Pro regula feriado en Italio (en la infanaĝo) kaj oftaj vojaĝoj al Francio la itala kaj franca lingvoj eniris miajn orlojn kaj restis en la kapo. Mi aŭskultis radion, kantojn aŭ homojn paroli en la koncernaj lingvoj, kaj fuŝajn aŭ diletantajn parolantojn de fremdlingvoj mi ne ŝatis kaj evitis. Ekzemple akiri normalan prononcon de la finna (kiu havas treege monotonan intonacion) ŝajnas esti pli facile ol de la nederlanda, kiu tamen havas tre specifan prononcon, kvankam ĝi estas multe pli proksima al la germana (en NL mi ĉiam parolis senĝene svisalemene kaj ŝajne esti komprenata de la homoj). Certe ankaŭ la hispanan kaj portugalan lingvojn oni devas longe ekzercadi por akiri la ĝustan prononcon. En la ĉeĥa kaj pola lingvoj oni devas al kutimiĝi al la akcentado de la unua resp. antaŭlasta silabo kaj al la sonoj rz resp. ř, kiuj tute ne ekzistas en okcidentaj lingvoj. En la rusa, kie la akcentado estas “dinamika”, oni devas lerni “redukti” neakcentitajn vokalojn (treege stranga fenomeno). En la itala oni devas diri teléfono anstataŭ telefóno (kiel en Esperanto aŭ en la germana). Ktp. Do por korekte prononci tiujn lingvojn oni eble devas havi certan talenton, kaj rutinon. Malgraŭ ĝia absolute freneza kaj absurda ortografio de la angla la lernantoj ŝajnas ĝenerale facile lerni ĉi tiun lingvon, kaj kiel vi diras oni povas senskrupule fuŝprononci ĝin por tamen esti komprenata. Ktp. ktp. La anglan lingvon mi ankoraŭ lernis per tute eksmodaj rimedoj en la gimnazio, kie la instruisto (bernano) pedante korektis gramatikajn erarojn, kiuj deviis de la normo. Por mi ekzistis ankaŭ alia problemo: Ĉar tiam mi jam scipovis Esperanton, mi ofte *pensis* en Esperanto kaj do faris diversajn penserarojn en la angla (kaj franca kaj latina), do la fifamaj interferoj konfuzis kaj turmentis min. Mi ankaŭ devas konfesi, ke la angla lingvo neniam ravis, emocie tuŝis aŭ interesis min (same kiel la tuta angla kaj usona mondo kaj kulturoj ne interesis min – mi estis nur unufoje en Anglio kaj neniam vizitis Usonon), do mi sentis neniun motivacion, bezonon aŭ utilon lerni ĝin, kun fatalaj sekvoj. Tiuj cirkonstancoj kondukis al malbonaj regado kaj kompreno de la angla, kaj la malbona kono de la angla lingvo negative influis la universitatan karieron, kiu ĝuste postulas bonan konon de la angla lingvo, en kiu oni devas verki kaj publikigi diversajn fakajn kaj klerajn studojn kaj elokvente paroladi en internacaj sciencaj kon-ferencoj, nuntempe eĉ multe pli ofte ol kiam mi studis en la 80aj jaroj.

Do mi iĝis pli slavema ol anglema. Sed en Ruslando mi alfrontis tute alian tipon de rusa lingvaĵo ol la tipo, kiun ni lernis en svisaj lernejoj pere de “klasikaj” lernolibroj. Sed mi sufiĉe bone alproprigis la rusan, tiel ke mi povas normale interparoli kun ruslingvanoj kaj facile legi (ekzemple gazetarajn) tekstojn aŭ sekvi televidajn elsendojn. Tiel efektive Esperanto restis la sola lingvo, kiun mi plej bone regas, parole kaj skribe. Tiun komunaĵon mi certe havas kun sennombraj aliaj e-istoj. Sed oni ne forgesu, ke mi estis aktivulo en “Esperantujo”, kiu utiligis Eon en plej diversaj situacioj, kaj ne apartenis al la “eternaj komencantoj”, kiujn karakterizas malalta kaj stagnanta lingvonivelo.

23

AK: Tipaj eraroj, kiujn Eo-parolantoj povas fari, rilatas nature ankaŭ al la gramatiko: krom al la akuzativo (en la tuta dimensio aŭ faceteco de ĝia uzado) ankaŭ al la uzado de la verboj (precipe se

temas pri ne/transitiveco, verbaspektoj kaj participoj, -ata/-ita), la distingo inter adjektivoj kaj adverboj, problemoj de la neado (negacio), artikolo, afiksoj kaj sufiksoj, prepozicioj kaj konjunkcioj, pluralo, ortografio (ekzemple z/s, k/h, geto, getto, ktp.), kondicionalo, subjunktivo/ konjunktivo, ktp. ktp. Sed problemoj povas koncerni ankaŭ sintakson, derivadon kaj vortfaradon, nomojn de landoj, etnoj kaj profesioj, ktp. Nu en la parola uzado koncernaj eraroj eble ankoraŭ estas tolereblaj, dum en la skriba uzado ne plu, precipe kiam temas pri publikigitaj tekstoj.

TC: Se vi volas eviti erarojn en lingvoj, kiujn vi lernas, preferu ne lerni ilin. Ekzistas lingvoprojektoj *sen* gramatiko (Suma, ekzemple). Oni povas facile diri “La vetero estas bela”, “Mia nomo estas Tazio” aŭ “mi emas dormi”. Do uzu Suma-n. Ĝi estas tiucele elstara. Laŭ mia memoro ankaŭ *Interglossa* estis sengramatika (kvankam sintakson ĝi havis).

AK: Ŝajnas, ke Eo heredis diversajn originajn “difektojn” de la okcidentaj aŭ hindeŭropaj naturaj lingvoj; mi parolas precipe pri iliaj lingvaj malregulaĵoj, nomeblaj eventuale nelogikaĵoj. Eĉ lertaj e-istoj estas devigitaj konsulti PIV kaj PAG en kazo de necerteco por kontroli la ĝustan aŭ laŭnorman lingvouzon laŭ la modelaj ekzemploj menciitaj en tiuj referencverkoj! E-istoj ĝis nun hezitis reformi tiujn lingvistikajn obstaklojn (ĉar ili timis la disfalon de Eo), eĉ la ĉapelojn ili konservis.

24

AK: Fakte Esperanto ne disfalis laŭ (aŭ en) dialektoj. Ĉu vi okupiĝis pri la fenomeno de la “slango” en Eo? Mi memoras, ke en diversaj duonpublikaj Eo-medioj kiel TEJO, CO de UEA aŭ en la privata medio de la familio Haupenthal aŭ de Giorgio Silfer estas/is uzataj Eo-lingvaĵoj, kiuj parte diferencas de la oficiala normo. Eble oni povas paroli pri socielektoj, aŭ en la alia kazo pri provo krei kaj apliki neologismojn. Eĉ diverslandaj e-istoj, ekzemple francoj (“kontinui”, “ekspliki”) aŭ rusoj (“elpaŝi”, “diablo prenu”, “dume”) uzas vortojn, kiujn aliaj kutime ne uzas, oni nomas tiun aĵon interfero (laŭ signifo 3 en PIV). Ĉu al vi estas konataj aliaj tiaj slangaj kazoj? Ĉu en Ido, Occidental-Interlingue kaj Interlingua okazis tia slangiĝo (verŝajne ne) aŭ povus okazi (verŝajne jes)? Pri Volapük ni jam ne plu parolu.

TC: Ĝenerale lingvo kun establita kulturo, lernejoj kaj minimumaj uzo-niveleoj ne disdialektiĝas. La latina disfalis pro la malapero de lernejoj kaj de kleraj homoj. La ekzisto de “slango” postulas la ekziston de grupo kun propraj specialaj distingo-traĵoj. Ekzistas kuracista slango, pastra slango, junulara slango... La slangoj estas ĝenerale mallongvivaj kaj reprezentas bezonon de reciproka agnosko inter socie proksimaj grupanoj. Mi mem memoras la junularan slangon en la itala (kaj en dialekto) el la jaroj 1968-9. En la 80aj jaroj “paninaro” (pl. “paninari”) estis ano de la milana kaj lombardia subkuturo, kiu uzis propran slangon.¹⁶ Slango ne estas neologismo. Slango respondas al bezono agnoskiĝi grupe per lingvo. Neologismo respondas al bezono havi specifan vorton por specifa koncepto. Ne nur en scienco, sed ankaŭ en literaturo.

AK: Paninaro sonas preskaŭ esperante, ĉu ne!

Ĉu do en Ido la diskuto pri slangoj kaj neologismoj ekzistis?

TC: Malfacila demando rilate slangon. Mi neniam aŭdis pri tio. Sed la demando pri neologismoj estis daŭra demando. Se iu bezonas novan vorton, li rajtas utiligi ĝin, sed devus indiki, ke temas pri neaprobata vorto (per *). Oni povas proponi ĝin al la Akademio, kiu decidos. Bedaŭrinde Ido-Akademio ne plu ekzistas, sed Unio por la Lingvo Internacia, de tempo al tempo, indikas specialajn homgrupojn por tiuspecaj decidoj. Ties decidoj evidente neniam estas devigaj.

¹⁶ Vd. <https://it.wikipedia.org/wiki/Paninaro>.

25

AK: Do ĉu Ido finfine estas dialekto de Esperanto aŭ memstara planlingvo?

TC: Ido tute ne estas dialekto de Esperanto. El la multaj idoj de la latina lingvo, dum la mezepoko parolataj en la itala duoninsulo, nur unu fariĝis grava kaj oficiala: la florenca dialekto. “Dialekto” estas lingvo, kiu ne fariĝis oficiala kaj restis iusence “duagrada”. Ne ekzistas lingvo “patrina” kaj al Esperanto kaj, samtempe, al Ido. La rilato inter du planitaj lingvoj havas nenion komunan kun la rilato ekzemple inter la nederlanda kaj germana aŭ inter la itala kaj venecia.

26

AK: Do kiu(j) laŭ via konvinko estas la merito(j) de la artefarite konstruitaj planlingvoj, precipe Esperanto, kaj kial ili fiaskis en la senco de la “fina venko”?

TC: Iu ajn lingvo povas fariĝi internacia. La homoj volonte lernos ĝin kaj eĉ forlasos la propran lingvon, kondiĉe ke tio alportas plibonigon de la propra sorto. Lerno de Esperanto alportas nenian plibonigon de la propra sorto aŭ de la sorto de la geinfanoj. Do la homoj ne lernas Esperanton. Kaj tial Esperanto ne povas fariĝi internacia lingvo en “universala” senco. Ĝi nur povas esti la internacia kaj komuna lingvo inter la malmultaj ekzistantaj esperantistoj, kiuj serĉas kaj ŝatas tiun izolecon. Aliaj homoj lernas Esperanton, ĉar ili ŝatas eksperimenti aŭ ludi per lingvo. Tial ekzistas la Esperanto-movado. Ankaŭ kelkaj idistoj lernis Idon por eksperimenti. Konstrui ne nur rakonton, sed ankaŭ la lingvon, en kiu oni rakontas.

AK: Tiuj ĉi demando kaj respondo do povus doni al ĉiu esperantisto la okazon mem demandi sin kial li aŭ ŝi lernas kaj praktikas Esperanton, ĉu ne.

27

AK: Ŝajnas al mi, ke la “gloraj” aŭ “klasikaj” tempoj de la interlingvistiko pasis – ne nur pro la forpaso aŭ retiriĝo de unuopaj ĝiaj “ĉefrepresentantoj” (aŭ “korifeoj”), kiuj formis, influis kaj praktikis la fakon. Ankoraŭ kelkaj homoj, ĉefe e-istoj mem, flegas ĝin. Ĉu restos ĉefe la (nostalgia) memoro pri la interlingvistiko (kaj esperantologio) kiel ĝi estis prezentita en la “griza” libro *Plansprachen*, redaktita de Reinhard Haupenthal kaj eldonita de Wissenschaftliche Buchgesellschaft Darmstadt 1976, al kiu ankaŭ vi kontribuis per leginda artikolo priskribanta la naturalisman skolon en interlingvistiko?¹⁷ Laŭ mi interlingvistiko estis tro “mis”uzata de la e-istoj por propra propagando, t.e. ĉefe por proklami la venkon de Eo super la naturalisma skolo kaj, krome, por aserti la superrecon de Eo super la angla lingvo. Do kio estas aŭ estu interlingvistiko?

TC: “Interlingvistiko” havas du difinojn: a) Temas pri scienco, kiu studas la uzon de planitaj lingvoj en socia kunteksto (Waringhien, koncerne Esperanton, parolis pri Esperantologio); b) Kaj/aŭ temas pri unu branĉo de la scienco, kiu gvidas al la konstruo de lingvo. La baza scienco estas *konstrua lingvistiko*. Ĝi tre gravas en landoj, en kiuj oni volas plivalorigi lingvon, igi ĝin ekzemple skriblingvo, aŭ faciligi ĝian instrudon. Interlingvistiko, kiel branĉo de la konstrua lingvistiko, celas konstrui interlingvan esprimilon. Siatempo oni diskutis pri *la plej oportuna lingvo prezentota*, sed hodiaŭ la lingvo internacia estas la angla. Sed ekzistas alispecaj komunikiloj, kiuj profitas/as de la iama konstrua lingvistiko.

28

AK: Ĉu laŭ vi Umberto Eco kompetente prijuĝis Esperanton (en sia libro *Serĉado de la perfekta lingvo?*)

¹⁷ La teksto estas elŝutebla sub https://www.taziocarlevaro.ch/dds_ling_storici.html.

TC: Jes, ĉar li vidis ne nur en Esperanto, sed en la tuta lingvokrea movado kulturan kaj konstruan forton. Li opiniis, ke por sin nomi “internacia” Esperanto devus troviĝi en ĉiuj aviadilaj terminaloj (supozeble ankaŭ en la zurika flughaveno). Laŭ mi li pravas. Lingvo ne fariĝas aŭ estas internacia pro la nomo, sed pro/per la uzo. Kaj Esperanto ne estas uzata en la avidadilejoj. Ankaŭ ne en la stacidomoj. Praktike nenie.¹⁸

AK: Kiel L.L. Zamenhof diris: Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia.

29

AK: Ŝajnas, ke neniam estis farita serioza planlingva provo en Azio, kiu reprezentus sintezon de iuj aziaj lingvoj, aŭ tia propono ne furoris kaj ne iĝis konata en la mondo. Ĉu do la revo pri la komuna planita universala helplingvo restas afero limigita al la Okcidento, precipe Eŭropo, kie aperis plej multaj da tiaj proponoj kaj projektoj?

TC: Eble oni ne bezonis ĝin en Azio. La ĉina skribo estis komuna al Ĉinio (dum la parolata lingvo tute ne estas komprenebla al la ĉinoj vivantaj en la sudo kaj nordo), Japanio, Koreio, Vjetnamio... kaj eble ankaŭ aliloke. Kaj poste alvenis la angla.

30

AK: Fine ankoraŭ iomete pri la tiĉina dialekto. Ĉu vi povus priskribi ĝian situacion, historie kaj aktuale. Ĉu ekzistas diversaj facetoj de la tiĉina dialekto?

TC: La tiĉina dialekto, kiu apartenas al la lombarda grupo de la norditala lingvaro, malaperas sufiĉe rapide. Nur 30% de la loĝantaro uzas ĝin. Pro larĝa enmigrado de ne-itallingvanoj, sed ankaŭ pro loka hodiaŭa neinteresiĝo pri la dialekto mem, kiu aspektas “ne-mode”, “ne-alte”, “ne-utile por la lernejo”. Do la gepatroj enfamilie parolas itale kun la gefiloj. Mi opinias, ke en la jaro 2050 ĝi ne plu vivos.

En Tiĉino ekzistas la dialekto de Airolo, kiu estas praktike nekomprenebla en Mendrisio. Fakte ne ekzistas “tiĉina” dialekto, sed lombarda dialekto forĝita de la fervojo, t.e. “dialet ferroviari”. Mi mem parolas ĝin denaske, dum mia avino parolis la dialekton de Bellinzona. La t.n. “fervoja dialekto” kunligas la komunajn trajtojn de Mendrisio ĝis Bellinzona, kun etaj lingvaj distingo inter norda kaj suda Tiĉino.

Kiam svisgermanoj de mia generacio, ĝis la naskiĝjaro 1970, migris al Tiĉino, ili lernis la dialekton. Samon faris la suditaloj enmigrantaj al Tiĉino. Tiu lingvo estis la integriga ilo. Nun ne plu. Ĝin forlasis, finfine, la tiĉinanoj mem.¹⁹

AK: Tre interese! Mi tute ne konsciis, ke oni devas distingi inter tiĉina “fervoja dialekto” unuflanke kaj diferencoj inter norda kaj suda variantoj aliflanke.

31

AK: Kaj jen plej lasta demando eble iom amuza aŭ kurioza. Vi kiel ano de la itala lingvo, kiu estas konsiderata kiel unu en la plej *belaj* lingvoj de la mondo: Ĉu laŭ via pritakso ekzistas – objektive vidite – *belaj kaj malbelaj* lingvoj, aŭ ĉu tio estas pure fantazia imago ligita kun la subjektiva opinio aŭ emocia percepto de homo, kiu entreprenas provon klasi la lingvojn laŭ tiaj kategorioj?

TC: Ne ekzistas “belaj” kaj “malbelaj” lingvoj. Tiaj juĝoj estas ofte nur modaj esprimoj. Siatempe nur la itala lingvo ŝajnis inda kaj taŭga por muziko kaj kantado. Nur poste aldoniĝis la franca kaj la

¹⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Umberto_Eco#Eco_pri_Esperanto.

¹⁹ Kromajn informojn vd. sub https://it.wikipedia.org/wiki/Lingua_lombarda (en la itala; la Eo-versio de ĉi tiu artikolo estas tro magra kaj tial ne utila, aK).

germana. Kaj, fine, ankaŭ la angla, kiu tamen fariĝis nun “plej taŭga” lingvo por muziko. Ne plu ekzistas modernaj operoj en naciaj lingvoj – krom en la angla. Kaj vi ne plu povas kanti en la germana (aŭ en la itala) ĉe la Eŭropaj kanson-konkursoj. Nur angle. Stulta afero, cetere.

AK: Lastatempe tamen reaperis en ESC kantoj prezentitaj nacilingve, kelkfoje miksite kun la angla. Sed en la kazo de la ESC la lingvo mem probable eĉ ne plu decide influas la demandon, kiu gajnos aŭ venkos la konkurson. Ŝajnas, ke aliaj kriterioj, faktoroj kaj konsideroj ludas pli gravan rolon.

AK: Dankon pro viaj interesaj respondoj kaj komentoj kaj ĉion plej bonan al vi!

(La intervjuo-dialogo estis farita skribe, iomete redaktita de la demandinto kaj travidita de la respondinto antaŭ publikigo.)

Rajto reaperigi ĉi tiun intervjuon en alia publikigilo nur kun la skriba konsento de Andreas Künzli.

© www.planlingvoj.ch, oktobro 2022.